5-a Jaro. N-o 248 APERAS  SEMAJNE 4. Julio 1929

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

LA FORMIĜO DE TUTMONDAJ TRUSTOJ KARAKTERIZAS LA PROGRESANTAN DISVOLVIĜON DE LA KAPITALISMO

La grandaj metal-"koncernoj" en Germanio troviĝis siatempe en grandaj malfaciloj okaze de la malvalidiĝo de l' germana valuto. Tiam, en januaro 1926, la kvar plej gravaj el tiuj ĉi koncernoj kunfandiĝis en unu solan entreprenon, la "Unuigitajn Ŝtalfabrikojn", kiuj fariĝis sekve de tio la plej potenca metalurgia entrepreno de Eŭropo. Ebliĝis tiu kunfandiĝo dank' al financa subteno fare de usona banko, nomata "Dillon Read".

Dank' al la sama banko ne longe post tiu tempo la plej granda kemi-produkta entrepreno de Germanio kaj de l' mondo, la "I. G. Farbenindustrio" efektivigis financan interligon kun la "Unuigitaj Ŝtalfabrikoj". La tiel formiĝinta kemi-metala trusto daŭrigis laŭgrade siajn progresojn. La plej grava estis la kontrakto kun la plej grava franca kemi-fabriko Kulman (Kuhlmann), same realigita kun la kapitala helpo fare de „Dillon Read". Ĉi tiu kontrakto plifortiĝas aktuale per kreo de komuna por-eksporta vend-agentejo kaj aliĝo al ĝi de svisaj kemi-fabrikoj. La nomita "Dillon Read"-banko ludis en tiuj ĉi trustiĝoj la rolon de voj-preparanto de l' usonaj industriistoj; ĝi estis komisiita prepari la formiĝon de industria trusto ampleksanta kelkajn el la plej potencaj industrioj de l' nova kaj malnova mondo. Tiel ĝi estis la komisiito de l' "Standard Oil", la usona petrol-trusto. La kontraktoj realigas efektive la plej gigantan truston iam ĝis nun formitan, la truston "Standard Oil - Farbindustrio - Ŝtalfabrikoj", koncentrigo, kiu transpasas ĉion, kion oni apenaŭ riskis imagi antaŭ kelkaj jaroj. Trusto, kiu ampleksas almenaŭ la duonon de l' tutmonda petrol-produktado, almenaŭ la duonon de l' tutmonda kemia produktado, kaj ne multe malpli ol la duonon de l' ŝtalproduktado de la plej granda centro ŝtalprodukta de la malnova mondo; trusto, kiu devas okupi nombron da laboristoj en kvanto de almenaŭ unu miliono.

La unua kontrakto farita antaŭ iom pli longa tempo inter la "Standard" kaj la "Farbindustrio" rilatis nur al speciala produkto, la sinteza aŭ artefarita petrolo, kiun la "Farbindustrio" pretendas povi produkti industrie. En tiu tempo oni ankoraŭ ne povis paroli pri vera trusto. Sed la novaj kontraktoj devas aliel esti konsideratai: ili havas ĝeneralecan karakteron, kiu efikas, ke la du entreprenoj nuntempe estas interligitaj intime kaj komplete. Fakte tiuj ĉi novaj kontraktoj ne nur celas ebligi ekfabrikadon de nova produkto, la sinteza kaŭĉuko, por kiu la du entreprenoj devigas sin teknike kunlabori, sed ili kondiĉas krome: 1. ke la du grupoj instalos kune fabrikojn por la fabrikado de azotaj sterkoj sintezaj, 2. ke la "Standard" donos sian rektan financan subtenon al la "Farbindustrio", kaj 3. ke la "Farbindustrio" en Usono instalos, helpate de "Standard", filion, kiu disponos pri pli ol 60 milionoj da dolaroj kaj starigos en Usono kolosan industrion de kemi-produktoj, tiel gravan kiel la "Farbindustrio" en Germanio, se ne pli grava.

Kiel oni sciaŝ, la usona kapitalismo konsistas el du grandaj grupoj: unuparte, la "Standard Oil"-grupo kun Rokfel'r, aliparte la grupo Morgan. Rokfel'r disponas en Usono la petrolon kaj ankaŭ la kupron, sed Morgan disponas la elektran konstruadon, la aŭtomobilon kaj precipe du pez-industriajn branĉojn: fermetalurgio kun la "Ŝtaltrusto" kaj la kemia industrio.

Nun oni komprenas la ekstreme lertan manovron de Rokfel'r: lia konkuranto disponas pri la usona kemio kaj la usonaj fand-fornegoj, li mem do prepariĝas por ekposedi la eŭropajn kemion kaj fandfornegojn. Rokfel'r kontraŭstarigos nun al la Morgana "Ŝtaltrusto" usona la plej potencan ŝtal-entreprenon de Eŭropo, la "Unuigitajn Ŝtalfabrikojn"; al la usona kemi-industrio li kontraŭstarigos la plej potencan entreprenon de kemi-produktoj en Eŭropo, la "I. G.-Farbindustrion". Kaj ne kontenta certigi al si tiel kunliganojn en Eŭropo, Rokfel'r forkondukas la plej potencan entreprenon en Usonon mem, por tie konkurenci, sur la loko, kontraŭ la malplej fortan el la industrioj de sia konkuranto, la kemian.

Ĉu Morgan kontraŭmetos al tiu giganta uson-eŭropa koncentrigo alian similan? Ĉu li provos, ekzemple, fari interligon kun la rekta eŭropa konkuranto de l' "Standard", kun la angla petrol-trusto "Royal Dutch", kiu jam komencis atakon kontraŭ la eŭropa kunligano de l' "Standard", depost la granda batalo kaŭze de l' rusa petrolo, anoncante fabrikadon de artefaritaj azotaj sterkoj ĝis nun sole faritaj de la "Farbindustrio"?

Ĉiuokaze estas notinde antaŭ ĉio, ke en tiu ĉi nun komenciĝanta epoko de imperialista kapitalismo, de monopolista kaj i n t e r n a c i e monopolista kapitalismo, al internaj antagonismoj de l' kapitalismo prezentiĝos en rimarkinde diferenca formo de tiuj, kiujn ni kutimas el la pli frua epoko, kie la kapitalismo baziĝis sur la naciaj ekonomioj. La milito de 1914 estis tipo por konkurencbatalo inter du naciaj ekonomioj. La situacio ne estas la sama ĉe la internaciaj ekonomiaj organismoj, kiuj estas interesataj preni por sia profito ĉiujn eblecojn de produktofortoj, kiuj malkovriĝas en iu lando, kaj ne kontraŭstariĝi al ilia disvolviĝo. Ne plu la teritoria formiĝo kreas la solidarecon aŭ konkurencon inter la kapitalistaj grupoj, de kiam ĉi lastaj sendependiĝas de l' teritoriaj formiĝoj. Certe la kaŭzoj por la naciaj antagonismoj ne tuta malaperas, ĉar estas nur malgranda parto de l' kapitalista industrio, kiu povas internaciiĝi; sed ĉi tiu parto estas la reganta, estas la granda industrio, la pezindustrio.

Konsidere tiujn faktojn ĉu ne estas erare transmeti simple en la estonton, kiel ni tro tendencas fari, la formojn, en kiuj okazis en la pasinto la konfliktoj inter kapitalistaj landoj? Ni staras antaŭ

tre interesa kaj grava problemo. Se respondo al tiu problemo estas malfacila, almenaŭ estas klare, ke la ekspluatataro devas ankaŭ tutmonde unuiĝi por limigi laŭeble la ekspluatadon ĝis la horo, kiam revolucia ondo ĝin tute forigos.

Laŭ diversaj fontoj kompiltradukis N. B.



PRI KLASBATALO

Rigardante la klasbatalan historion precipe de post la jaro 1918, ni povas konstati rimarkindan fakton. La laboristaro estas disigita en multaj partioj kaj metiaj sindikatoj; ĉiu batalas kvazaŭ aparte por plibonigi sian situacion. La rezulto estas, ke anstataŭ liberiĝo el la kapitalistaj ĉenoj, okazas la malo. Ni povas observi, ke la laboristaro hodiaŭ estas pli multe ekspluatata ol iam antaŭe, kaj la mizero inter la laboristaro ankaŭ proporcie pligrandiĝis.

Aliflanke ni povas vidi, kiel la kontraŭbatalata kapitalismo pli kaj pli fortiĝis kaj akceptas evolu-formojn direktiĝantajn al vera sennacieca baziĝo. En la batalo kontraŭ la laboristaro ĉiuj dekstraj partioj estas unuanimaj sur la tuta fronto eĉ ignorante la landlimojn. Sed kiel aspektas la klasbatalo kontraŭ tiuj ĉi vampiroj? Se en parlamento unu laborista partio faras proponon, kiu povus plimalgrandigi la mizeron de la laboristoj, tuj alia laborista partio kontraŭstaras argumentante, ke tio estas nur partipolitika agiteca propono ktp. Sed per tiaj agmanieroj al la laboristaro ne estas farata bona servo.

Simile aspektas la klasbatalaj metodoj ĉe la metiaj sindikatoj. Kontraktoj pri salajro-tarifoj estas farataj, la salajro ankaŭ iagrade altiĝas, sed la mizero de la laboristaro ne malgrandiĝas. Kiel tiu fakto estas klarigebla? Nu, la klarigo ŝajnas al mi tre simpla: La kapitalismo kompensas ĉiun salajr-altigon por la laboristaro per prezaltigoj sur la varoj. En tiu maniero la salajraltigoj efektive ĉiam estas nuligataj. La pozicio de la laboristo post la salajraltigoj restas same malbona kiel antaŭe. Ĉu ne ĉiu nova postulo por altigo de l' salajro klare pruvas, ke la antaŭa procedo estis tute senefika?

Sed kiam la salajra plialtigo estis akirata per striko, tiam la afero estas tiom pli malbona, ĉar la salajr-altiĝo modifiĝas laŭ stato de antaŭaj monatoj (en kiuj komenciĝis la striko), kaj dume la prezaltiĝo sur la varoj komplete nuligis la rezulton akiritan.

El tio ni povas konkludi, ke tiu malnova klasbatala metodo en la nuna tempo perdis sian taŭgecon kaj vivpravecon. Per tiaj bataloj la laboristaro nenion povas atingi. Anstataŭ la laboristaro, la kapitalistoj profitas el ili. Tial estas nepre necese reorganizi la metodojn de klasbatalo. La lab. gvidantoj devas provi unuigi la tutan laboristaron en ĉiu lando en unu sola laborista sindikato. Poste tiuj ĉi landaj laboristaj sindikatoj denove organiziĝu en tutmonda laborista sindikato. Nur tiel sukcesa klasbatalo estas garantiata. Sed hodiaŭ la unuopaj bataloj de elĉerpita laboristaro, sanganta el mil vundoj, estas kondamnitaj dekomence je malsukceso. La entreprenistoj kaj ankaŭ komprenebte la registaroj bezonas nenion timi pro tiaj izolaj strikoj.

Ĉiuj prosalajraj bataloj post 1918 estis nur malsukcesoj por la laboristaro, tute indiferente ĉu la salajra batalo finiĝis kun aŭ sen salajra plialtiĝo. La kapitalismo, kiu mem kreis al si potencajn internaciajn organizojn, povas sendomaĝe primoki niajn izolitajn sindikatojn aparte batalantajn ĉiu por si mem. Nur fortega unueca laborista sindikato tutmonda povus kontraŭstarigi imponan potencon al la kapitalistaj mondtrustoj. Unu el la plej gravaj taskoj de tia sindikato estus eldevigi leĝon, kiu malpermesus, ke ĉiu salajr-altigo estu aŭtomata nuligata per altigo de la varprezoj. Estus bone, se ĉiulandaj laboristoj, precipe en la industriaj landoj, diskutus tiujn pensojn kaj proponojn, por baldaŭ atingi sukcesojn tiucelajn.

SAT-ano 14 157, Krimiĉaŭ (Crimmitschau). Germanio.

STRIKMOVADO EN BULGARIO

En tiu ĉi momento strikas en Bulgario pli ol 25 mil tabaklaboristoj, en Plovdiv 12 mil, Ĥaskovo 7 mil, Stanimoka 2 mil, Korĝali 2 mil, Ŝeh Ĝumaja, Ekri-Lehe 3 mil, Rejkovo mil. La tabaklaboristoj postulas de siaj mastroj plialtigon de siaj mizeraj salajroj. La entrepenistoj ĝis nun nenion volas konsenti al la laboristoj. Kiam tiuj ĉi linioj verkiĝis, pasis jam 18 striktagoj. La tabaklaboristoj volas montri per tiu striko al la faŝista registaro, ke ili sub tiu ĉi reĝimo mizeras kaj suferas. Laŭ faŝistaj leĝoj en Bulgario strikoj estas malpermesitaj, kaj tiu ĉi vasta striko estis metata ekster la leĝon. Sed la vivo konfirmas, kiel ĝuste kaj juste la laboristaro agas. Por la vivbatalo, por potenca volo ne ekzistas leĝoj nek limoj.



Strikkunveno de l' tabaklaboristoj

Nun, kiam strikas la 25 mil tabaklaboristoj, la faŝista registaro sentas sin tro malforta por bari la vojon al la strikantaro kaj malpermesi la strikon. La laboristaro kontraŭstaras la faŝistajn ordonojn. La sanga registaro ja aranĝas ekscesajn agojn kaj tielnomatajn "ekspediciojn" kontraŭ la strikantaj K-doj. Sed la laboristaro, dum 6 jaroj da sanga buĉado kutimigita je multaj teruroj, nun ne plu timas ion, ne plu malkuraĝas, ĉar ree pafas en la stratoj. La malsato estas pli forta ol la timo kontraŭ pafiloj.

La salajroj, kiuj ĝis nun estis pagataj al la tabaklaboristoj, estas jenaj: En Plovdiv viroj ricevas tage (kvalifikitaj) 90, 86 levojn[1]; nekvalifikitaj laboristoj 80, 75, 70 lv.; virinoj (kvalifiktitaj) 65 ĝis 55 lv.; infanoj 40, 38, 35, 34, 32 lv. En Ĥoskovo viroj ricevas 85, 80, 75 lv.; en Stanimoka 80, 75, 70 lv.; en Korĝali 75, 70, 65 lv., ktp.

Dum la kosto de la produktoj plikariĝas ĉiutage, la salajroj restas en sama nivelo. La bulgara laboristaro ne ĉesos batali energie per ĉiuj rimedoj kontraŭ tiu prezpolitiko, kontraŭ la malsat-mortigo de l' faŝista registaro.

Bulgarano.



La kontraŭfremdula Usono

Vole nevole S-ino Rosika Ŝvimer (Schwimmer) laŭ decido de ĵus donita juĝo de la "Supreme Court" (elp. Suprim Kort, la ĉefa juĝejo de Usono, kiu interpretas la leĝojn) devas resti sennaciulino. Jen la faktoj: S-ino Ŝvimer en la hungara administracio sub Karolyi estis la diplomata reprezentanto en Svisio. Kiam Bela Kun akiris povon (marto 1919, ŝi rezignis sian oficon, ĉar ŝi ne estas komunista. Suferinte multe pro la "blanka teroro", ŝi kaŝe kaj sen pasporto forlasis Hungarion kaj decidis fariĝi usonano. Usonon, landon de komforto, landon de libereco, landon de Vaŝington, Franklin kaj Linkon ŝi elektis. Hungario forĵetis ŝin, sed nova lando, kie Horti ne regas, bonvenigus ŝin. Ĉar ŝi loĝis en Usono depost j. 1921, ŝi povas daŭri sen timo esti elĵetata (ĉar loĝado dum 5 jaroj neebligas eksporton de homo, se li ne krimas). Kien oni elĵetus ŝin, estus alia problemo!

Enmigrinto, por fariĝi usonano, devas unue peti la "unuajn paperojn", plenigi ilin, formale rezigni sian antaŭan landon, ĵuri lojalecon, prirespondi demandojn pri sano, politikaj opinioj ktp. Ne plu ol du jarojn poste kaj post kvinjara loĝado en Usono la estonta usonano ricevas la "duajn paperojn" kaj poste povas esti kandidato por publika ofico, voĉdoni ktp.

Rosika Ŝvimer rifuzis deklari en sia respondaro, ke ŝi "portus armilojn en defendo de Usono". Pro tio la juĝistoj rifuzis naciecon al tiu ĉi 52-jara pacifistino. Ŝi restas senlandulo kaj se ŝi ekvojaĝus, eble ŝi ne ricevus la rajton denove eniri Usonon. Pro multaj protestoj kontraŭ la decido kaj ĉar ŝi estas kontraŭ-komunista, kredeble ŝi ne partoprenos en la sorto de diversaj alilanduloj, kiuj pro sia "ruĝeco" estas resendataj

[1] 100 levoj = 0,75 dol.

al sia "propra lando" kaj ofte ricevas punon.

Notinde estas, ke 3 kontraŭ 6 el la ĉefjuĝistoj subtenis ŝian rajton, sed Butler esprimante la decidon de la plejmulto, diris kulpige: "Ŝi ne havas senton de naciismo, sed nur kosman (= tutmondan) senton de aneco en la homa familio." Ŝajne neniu SAT-ano povas esti usonano.

*

Ĉiudekjare nombriĝas la usona loĝantaro kaj laŭ la rezulto fiksiĝas la nombro da reprezentantoj, kiujn ĉiu distrikto kaj ŝtato povas sendi al la Parlamentejo. Reakciuloj postulas, ke la "aliens" (alilanduloj, kiuj ĝis nun ne fariĝis usonanoj) ne enkalkuliĝu kaj asertas, ke jam loĝas 3 milionoj da tiaj homoj ĉi tie. Fakte la "Kapitolo" mem, kie la parlamentanoj diskutas, estis konstruata laŭ plano de angla alilandulo; alia fremdulo — Brumidi — pentris la freskojn sur ĝia muraro dum 30 jaroj. La ĉefurbo Vaŝingtono mem konstruiĝis laŭ plano de franca alilandulo, Lanfan (L' Enfant). Kvinono el la statuoj en la parkoj memorigas nin pri homoj naskitaj alilande. Naciemulo ĉiam fermas la okulojn antaŭ la faktoj. (488)



EL JUGOSLAVIO

Jugoslavio estas laŭdate la lasta en la vico da faŝiste regataj landoj. Sed ĝiaj diktatoroj ne estas la malplej fervoraj en la plenumo de faŝismaj metodoj. "For la demokration" estas la batalvoko de niaj potenculoj, gardantoj de "ordo kaj libereco".

Kiel ekzemplon mi citu la okazojn de l' unua de majo. Malpermesitaj estis ĉiuj manifestacioj, kunvenoj, paroladoj, koncertoj k. s. Ankaŭ insignoj, ruĝe presataj gazetoj, flugfolioj kaj eĉ artikoloj pri demokratio kaj kontraŭ armado estis ne allasataj. Sed oni "libere" elektigis al laboristoj, ĉu festi aŭ labori en tiu tago. Kia efiko... Malgraŭ ĉio en la koroj de klaskonsciaj niaj laboristoj blovas alia vento, forta espero je pli bela libera tempo, por kies elakiro batalas la tutmonda proletaro festante sian feston de laboro.

En n-o 237 de "S-ulo" mi legis pri malbonaj salajroj de usona gelaboristaro. Sed lasu min kompari la mizeran staton de l' jugoslavaj laboristoj, kiuj ricevas monate tiom, kiom iliaj usonaj K-doj semajne, sed por 8—10-hora laboro: dinarojn 750—2000 (= 15—35 dol.). Kaj eĉ konsiderante, ke en Usono la aĵoj estas pli multekostaj, tamen la salajroj tie estas kompare je 100% pli altaj. Multaj samprofesiaj laboristoj laborakiras eĉ ne 400 dinarojn monate, laborante ĉiutage 12 ĝis 16 horojn. Ĉu oni povas imagi, kiel iliaj familioj povas vivi?

Estas kompreneble, ke la hodiaŭ ŝtato por la mizeruloj, invalidoj, senlaboruloj ne havas monon, same kiel por aliaj necesaj kaj utilaj aferoj. Ĉar oni scias, ke ĝi konsideras plej necese zorgi pri militarmado...

Malgraŭ tiuj teruraj cirkonstancoj ni restas je niaj postenoj: Por libereco kaj socialismo! SAT-ano 9135.

Al ĉiuj SAT-anoj kaj proletaj esp-istoj de Pacifik-Oceanaj landoj kaj de la tuta mondo!

La 15-an de aŭgusto 1929 en Vladivostok (USSR, la 9-a horzono) malfermiĝos la Unua Pacifik-Oceana Kongreso de Revoluciaj Sindikatoj. Tiu ĉi kongreso estas organizata de la tielnomata "Pacifik-Oceana Sekretariaro de Sindikatoj". (La historion de tiu sekretariaro skizos aparta artikolo).

La kongreson partoprenos delegitoj de revoluciaj sindikatoj el jenaj landoj: (la ciferoj signifas la nombron da delegitoj el koncernaj landoj) Sovetio — 15, Japanio — 10, Koreo — 2, Formosa — 1, Ĉinio — 12, Anglio — 1, Hindio — 8, Aŭstralio — 6, Nova Zelando — 2, Nederlanda Hindio — 3, Francio — 1, Franca Hinda Ĉinio — 1, Filipinoj — 1, Havajoj — 1, Kanado — 2, Usono — 2, Latinamerikaj landoj (po 1 delegito el ĉiu). Sume 90 delegitoj el 34 landoj.

En la tagordo de la kongreso staras multaj tre gravaj demandoj: 1. Raporto de Pacifik-Oceana Sekretariaro. 2. La militdanĝero kaj batalo kontraŭ la imperialismo. 3. La koloniaj malliberigaj movadoj kaj rolo en ili de sindikatoj kaj de kamparanaj organizoj. 4. La unueco de la tutmonda sindikat-movado. 5. La en- kaj elmigrado en Pacifik-Oceanaj landoj. 6. La programo de agado (la 7-hora labortago, la minimuma salajro, la virina kaj infana laboro, senlaboreco, la labordefenda leĝaro, la proksimaj konkretaj taskoj en Ĉinio, Japanio, Filipinoj, Hindio. Nederlanda Hindio ktp.). 7. Organizaj demandoj. 8. Reelektoj de Pacifik-Oceana Sekretariaro".

La taskoj de la kongreso estas nemezureble gravaj kaj malfacilaj. Estas bone konate, ke dum kaj post la imperialista milito de 1914/18 la koloniaj kaj duonkoloniaj landoj de l' Oriento komencis rapide industriiĝi. En tiuj landoj rapide kreskas la nombro (kaj ankaŭ kvalito) da laboristaro. Kreskas ĝia revoluciemo kaj klaskonscio, ĉar ĝia jura kaj ekonomia stato estas netolereble peza. Tion atestas la grandioza strikmovado kaj multaj proletaj ribeloj dum lastaj jaroj en Ĉinio, la sennombraj strikoj laboristaj en Hindio, kaj en aliaj landoj, la ribelo en Nederlanda Hindio ktp.

La imperialista burĝaro kaj ankaŭ la "nacia", sentante gravan danĝeron, malvolvas kruelan atakon kontraŭ la laboristaro, larĝe uzas blankan teroron por senfortigi la proletaron. Krom tio la imperialistoj disblovas la nacian malamon, incitas unu rason, unu popolon kontraŭ alian, penas malpacigi laboristojn inter si. Tial: "Ne raso, sed klaso!" "Ne laŭrasa aŭ laŭnacia divido, sed unuigita klasbatalo!" "Batalo kontraŭ imperialista kaj kontraŭ sia 'propra' kolonia burĝaro!" Jen estas la ĉefaj devizoj de la kongreso!...

La interesoj de laboristoj el koloniaj kaj duonkoloniaj landoj estas nuntempe dense ligitaj kun tiuj de laboristoj el imperialistaj landoj. La neimageble malaltan vivnivelon de laboristoj el koloniaj kaj duonkoloniaj landoj la kapitalistoj bonege uzas por ataki la proletaron de metropoloj, por malaltigi ilian vivnivelon. Tial la laboristoj de Anglio, Francio, Japanio, Usono, Aŭstralio devas intime kontaktiĝi por komuna batalo kun siaj kunfratoj en koloniaj kaj duonkoloniaj landoj de Pacifik-Oceanio. Tiun kontakton devas efektivigi la kongreso!...

* * *

La Vladivostoka SAT-anaro pretas per ĉiuj siaj modestaj fortoj priservi la kongreson. Ĝi esperas, ke ne nur unu sola esp-isto troviĝos inter la delegitoj de la kongreso, kaj ĝi pretas liveri tradukistojn por ĉiuj delegitoj parolantaj esperante. La Vladivostoka SAT-anaro ankaŭ intencas partopreni la internacian ekspozicion aranĝotan dum la kongresaj tagoj, kaj ĝi petas la SAT-anojn el ĉiuj, precipe el Pacifik-Oceanaj landoj, urĝe sendi al ĝi diversajn materialojn (afiŝojn, gazetojn, flugfoliojn, fotojn, dokumentojn ktp.), karakterizantajn la proletan vivon kaj batalon en la tuta mondo. Ĉiujn valorajn materialojn laŭ deziro de sendintoj ĝi promesas resendi al ili post la kongreso aŭ rekompenci per fotoj kaj gazetoj ilustrantaj la kongreson.

Fine la Vladivostoka SAT-anaro petegas SAT-anojn el la tuta mondo urĝe aranĝi la alsendon de salutleteroj de diversaj sindikatoj kaj aliaj proletaj organizoj al la kongreso, en siaj koncernaj landoj kaj urboj. Nur granda amaso da tiaj leteroj superŝutontaj la kongreson estas valora por ni!

Ĉion senprokraste sendu laŭ adreso: Vladivostok, USSR, Poŝtkesto n-o 56, al Pacifik-Oceana Kongreso de Sindikatoj." Letero el Eŭropo atingas nin post preskaŭ 3-semajna vojaĝo, el Sudameriko post pli ol unu monato. Konsideru tion kaj ekagu tuj! Ni estas plene konvinkitaj, ke bona utiligo de esp-o dum tiu gravega kongreso signifos grandan progreson de esp-o en proletaj amasoj de tuta Pacifik-Oceanio! Tial ni ne devas preterlasi bonegan okazon. Ni esperas je via abunda helpo, tutmonda SAT-anaro!

Je nomo de Vladivostoka SAT-anaro,
K. Fade (3717), Zuj Jak. (4112),
A. Semjonov (10624).

Noto de la Red. — *Tiu artikolo trafis nin nur la 22-an de junio k sekve povis esti sendinta al la presejo nur la 26-an. Ni ja sendas la manuskriptojn nur ĉiun vendredon el la redaktejo al la presejo. Sekve oni devas nepre aranĝi, ke la manuskriptoj estu almenaŭ 14 tagojn antaŭ la aperdato de difinita n-o en niaj manoj. Nur escepte, en tre gravaj okazoj ni sendas koncizajn notojn pli malfrue ol vendrede al la presejo. Tamen, se la K-doj tuj pritraktos la supran alvokon, ili povos helpi al niaj pacifikaj K-doj ankoraŭ ĝustatempe kaj efike.*

La multkoloraj, ilustritaj poŝtkartoj de SAT

estas unika provo, bilde esprimi nian idealon. En la korespondado kun varbotoj tiuj kartoj estos tre utilaj al vi. Tial aĉetu ilin ĉe la **Administrejo de SAT,** R. Lerchner, Colmstr. 1, **Leipzig O 27.** La kompleta serio, konsistanta el 5 diversaj kartoj, kostas **0,50** g. mk.

Konsumkooperativo Lajpcig-Plagvic k ĉirkaŭaĵo


(Konsumverein Leipzig-Plagwitz und Umgegend, e. G. m b. H.)

Tiu ĉi artikolo estas speciale verkita de la konsumkooperativa administracio por "S-ulo".

Post parolado pri la sukcesoj de la honestaj pioniroj de Roĥdale (Rochdale) en la jaro 1883/84 kunligiĝis parto de la laboranta loĝantaro de Lajpcig-Plagvic en konsuma societo, en la "Konsumverein Leipzig-Plagwitz und Umgegend. e. G. m. b. H.".

La kooperativo starigis al si la taskon, kolektive havigi al la kolektivanoj la necesajn vivbezonaĵojn. Per la komuna aĉeto de tiuj konsumaĵoj oni celis unuavice ekonomian profiton por la konsumantoj. Oni volis ŝpari por si la gajnon, kiun profitis la detal-komercistoj de la konsumantoj. La profito atingita el la propra entrepreno, estu gajn-notita kiel ŝparaĵo de la kooperativaj membroj. Laŭ tiuj aksiomoj organizite, la juna entrepreno travivis rapidan kreskon. Jam post kvinjara ekzisto la kooperativo nombris ĉ. 25 mil familiojn kiel membrojn. Peza ekonomia premo samkiel atakoj flanke de la butikistoj ne povis haltigi la evoluon de la kooperativo. En la jaro 1904 la kooperativo ampleksis, post 20-jara ekzisto, ĉ. 37 mil familiojn. La familio estas kalkulita je meznombre 5 personoj; sekve la kooperativo priservis per manĝaĵoj ĉiuspecaj k vestoj loĝantaron de urbo nombranta 182 300 loĝantojn. Nuntempe la kooperativo unuigas 60 mil membrojn por kolektiva mastrumado. Frutempe jam la kooperativo komencis transpreni la produktadon, la parton, kiu estis farata en metiaj produktejoj, por ŝpari por la konsumantaro ankaŭ la gajnon, fluantan al la privat-mastrumado.

La konsumkooperativo nuntempe funkciigas 2 grand-bakejojn, 1 buĉejon, 1 sukeraĵejon, 1 kafo-rostejon, 1 buter-formejon, 1 ŝu-farejon, proprajn maŝinriparejon, lignaĵejon k lad-prilaborejon. Ĝi krome partoprenas en la Pogrand-aĉeta Societo de Germanaj Konsumkooperativoj ("Grosseinkaufs-Gesellschaft Deutscher Konsumvereine m. b. H."), mallonge titolita "GEG". La "GEG" nun havas 34 modern-aranĝitajn fabrikojn, en kiuj estas produktataj la konsumaĵoj por membroj aliĝintaj al la germanaj konsumkooperativoj.



Ĉef-produktejo de la Konsumkooperativo Lajpcig-Plagvic k ĉirkaŭaĵo

La jara spezo 1927/28 estis en la "Konsumverein Leipzig-Plagwitz und Umgegend" ĉ. 38 milionoj da markoj. En la mastruma jaro 1928/29 tiu spezo atingos 46 milionojn da markoj. La membroj ricevis kiel ŝparaĵon 5% de la spezo. Tiel do estas pagitaj al la membroj por la kuranta jaro sume 2,3 milionoj da markoj.

La priservado de la membroj per vivbezonaĵoj okazas en 159 filioj diversspecaj. Krom la manĝaĵ-vendejoj la "Konsumverein Leipzig-Plagwitz und Umgegend, e. G. m. b. H." funkciigas 36 specialajn filiojn por vendado de viandaĵoj k 4 magazenojn.

Kiu volas utiligi la gajnon de sia laborforto je profito de sia familio, ignorante la privatkapitalistan metodon, partoprenas kiel membro la kolektivan mastrumadon de la konsumkooperativoj.

Konsumverein Leipzig-Plagwitz und Umgegend e. G. m. b. H.
(Trad.: K. K.)

Vizito al la konsumkooperativo Lajpcig-Plagvic

jam estas entenita en la plano por kongresaj aranĝoj. La vizitoj okazos lundon k vendredon matene — dum la kongressemajno. Certe tiuj vizitoj estos plej interesaj por ĉiuj Gek-doj. Do ne preterlasu la okazon, veni al la 9-a SAT-Kongreso, tiel akcelante la progresadon de nia komuna celo k samtempe profitante studi la laboristajn entreprenojn de Lajpcig.

K. K.

BRITAJ MINISTOJ KAJ ILIAJ FORLASITAJ LEGOM-ĜARDENETOJ

En la industriaj partoj de Anglio troviĝas multe da legom-ĝardenetoj, prikulturataj de la industri-laboristoj dum iliaj liberaj horoj. Tiuj ĉi ĝardenetoj lokiĝas apud la hejmoj de la laboristoj, kiuj luas ilin plejofte de la urbo mem. Oni plantas en ili la plej uzatajn legomojn, t. e. terpomojn, pizojn, fabojn, brasikojn k. a. Ministoj estas la plej entuziasmaj legom-ĝardenistoj (angle: "allotmenteers").

Tiu ĝarden-kulturado, kompreneble, estas bona temp-pasigilo kaj mon-ŝparilo. Oni povas provizi al si sufiĉe da legomoj por uzi tra la tuta jaro. Kelkfoje eĉ restas por vendi al aliaj. Ofte okazas, ke post jaroj da kulturado la terposedanto rifuzas reluigi la terparton, ĉar la tero estos pli valore uzata por konstruoj.

Pro la lastaj malbonaj tempoj spertitaj de la ministoj, multaj pro sia nekapablo pagi la luprezon estis devigataj forlasi siajn ĝardenetojn, kiuj nuntempe estas en sovaĝa stato. Por helpi plibonigi la vivstaton de la ministoj, la kvakeroj (religia sekto) starigis 53 lokajn organizojn, kiuj mem pagas la lupagon. Ĝis nun dudek miloj da help-petoj estas ricevitaj. Oni ankaŭ gajnis valoran apogon de la registaro. Laŭ la regularo de la "Senlaborula Oficejo" oni rajtas ricevi la ŝtatan monsubvencion nur, se oni povas pruvi, ke oni serĉas laboron kaj ne povas trovi ĝin. Sed nuntempe oni rajtas ricevi tiun subvencion, dum oni kulturas legom-ĝardenon . . .

L. B. (8048) Leeds.

ĈU VI JAM PAGIS VIAN KOTIZON POR LA JARO 1929? SE NE, RAPIDE FARU TION!

Ni ricevis jenan leteron:

"Karaj Kamaradoj!

"CK SEU pridiskutis la publikigitan en 'S-ulo' n-oj *241* k *242* 'Deklaron de la SAT-Direkcio'. Ĉar per ĝia pinto tiu deklaro estas direktita kontraŭ 5 membroj de CK SEU k kontraŭ SEU ĝenerale, CK SEU deklaras: — 1. CK SEU unuanime k plene subtenas la presitan en 'S-ulo' n-o *222* proteston de 5 kamaradoj, direktitan kontraŭ agoj de la SAT-Direkcio, kiu, kontraŭstarante la proponon pri akcepto de speciala programo, uzis argumentojn neniel akcepteblajn por multaj el tiuj, kiuj ĝis nun plej sincere subtenis SAT. 2. CK SEU unuanime k plene subtenas la presitan en 'S-ulo' n-o *237* konstaton de K-do Drezen, ke fakte la SAT-Direkcio devis 'per siaj agoj k sia pozicio doni la ĝustan direkton al la tuta SAT-laboro k eĉ al la diskutado, se ĝi fariĝas necesa'. CK SEU same akceptas la aserton de K-do Drezen, ke 'la konstaton pri neneceso de programo la Direkcio estus povinta fari ne entreprenante iun larĝan teorian studon', kiu rezultigis la nunan situacion malagrablan. Cetere, eĉ la Direkcio de SAT konsentas paroli pri 'malbona balailo' — malbonaj iloj uzitaj dum tiu diskutado (v. n-o 241). 3. CK SEU konstatas, ke la SAT-Direkcio, deklarinte en 'S-ulo' n-o *237*, de 18 apr. 1929, ke ĝi konsideras la diskutadon utila, k malakceptinte per tio la proponon de K-do Drezen pri ĉesigo de diskuto, rifuzis enpresi artikolon de K-do Drezen 'Pri eraroj de SAT-gvidado' de *23* aprilo 1929, en kiu estis parolita pri jeno:

a) Dum la Göteborg-a kongreso K-do Lanti proponis, ke la programo de SAT ne kontraŭu la programon de ia politika klasbatala partio (p. 47 de la 'Protokolaro'). b) Laŭ komisio de SAT-Direkcio K-do Lanti verkis 'kvazaŭan programon' kiu rekte kontraŭas en la punkto pri imperialismo al konceptoj de certa partio (p. 63 de la sama 'Protokolaro' k antaŭparolo al la broŝuro 'La Laborista Esperantismo'). c) La gvidanto de SAT bonuzis la paĝojn de 'S-ulo' por daŭrigi propagandon de siaj propraj ideoj, absolute ne akcepteblaj por multaj SAT-anoj, utiliginte tiucele eĉ la morton de K-do Nedjam Mohamed.

Ankaŭ tiujn ĉi parolojn de K-do Drezen CK SEU plene subtenas. 4. CK SEU deklaras, ke la cit-o en 'S-ulo' n-o 242, ke certaj Sovetiaj esp-istoj proponis siatempe aliĝon de SAT al Komintern, koncernas la komencon de la j. 1923, kiam SEU apenaŭ komencis sian laboron. Tiuj kamaradoj k ankaŭ CK SEU jam en la sama j. 1923 konfesis sian pozicion tiutempan erara k depost tiu tempo tiurilate plej lojale subtenis SAT. La SAT-Direkcio bone tion scias k havas de post la j. 1923 neniun kaŭzon por iu plendo. Interalie tiu siatempa eraro estis publike konfesita de CK SEU en letero sendita al GLEA en la j. 1927 por ĝia eksterordinara Asoci-tago. 5. CK SEU deklaras, ke SAT en Sovetio k en la rusa lingvo ĉiam estas laŭtradicie prezentata kiel "organizo unuecfronta" (laŭidee identa al organizo "unueca"). Do la provo per cito de tiu ruslingva termino trovi reviziemon ĉe K-do Drezen ne estas sukcesa k lojala. Cetere en la rezolucio de la III-a SAT-Kongreso en Kassel, estas esprimata la espero, ke "klasbatalaj laboristoj formos unuecan fronton, kiel la SAT-anoj". 6. CK SEU protestas kontraŭ la neniel bazita supozo de la SAT-Direkcio, ke iuj K-doj membroj de CK SEU povus voli aŭ provi "per trompa tendenca informado pri SAT ĉe respondecaj instancoj okazigi skismon en nia movado". CK SEU asertas, ke speciale K-do Drezen faris multon por ebligi al SAT daŭrigi ĝian laboron en Sovetio — malgraŭ la supreciitaj nelojalaj agoj de la Direkcio k de la Redakcio. 7. CK SEU konstatas, ke la Direkcio de SAT per sia deklaro, presita en n-oj *241* k *242* de "S-ulo", provas kulpigi personojn senkulpajn k provas ne respondi al precizaj demandoj starigitaj de K-do Drezen en la nepresita artikolo de *23*. aprilo "Pri eraroj de SAT-gvidado". Venis la tempo por postuli, ke la Direkcio decidu, ĉu validas pluen la ĝisnunaj gvidprincipoj de SAT k la konforma decido de la Göteborga Kongreso (p. 47 de la "Protokolaro"). Se tiuj principoj daŭras validi — tiuokaze oni ĉesigu la nunajn metodojn batali en "S-ulo" kontraŭ la certaj principoj de certaj revolucianoj k tiuokaze oni aldone konfesu, ke "La Laborista Esperantismo", tiu kvazaŭa programo, verkita laŭ komisio de la Direkcio, k precipe la argumentoj kontraŭ la baza programprojekto, estis mispaŝo, ne servanta al unueco de la SAT-anaro.

Membroj de CK SEU: G. Demidjuk, N. Nekrasov, V. Varankin, N. Incertov, S. Ŝabarin, A. Milovidov, J. Klys, Dim. Sneĵko. — Membroj de Revizia Komisiono de SEU: A. Kazakeviĉ, H. Ponjatovski, A. Miloslavskaja. — Membroj de Blankrusia Komitato SEU: P. Kirjuŝin, R. Ŝukeviĉ-Tretjakov, Kac M., P. Prohorĉik.

Moskvo, junio 1929."

*

Al la ĉi supra letero ni faros nur jenajn rimarkojn: 1. LA SAT-Direkcio estis akuzata de 5 membroj de la CK de SEU (Oni vidu n-on 222 "S-ulo") pri "reviziemo" k laŭ maniero, kiu vekis indignon ĉe tre multaj SAT-anoj. Ni do estis devigataj rebati la akuzon k ni facile pruvis, ke ĝi estas absolute senbaza. Se en tiu nia rebato ni tro forte ĵetis sagojn k se iuj mistrafis, ni tion sincere bedaŭras. Almenaŭ ĉiu bone notu en la memoron, ke antaŭ ol esti atakitaj ni neniam provis inciti mem batalon. 2. Siatempe K-do Drezen estis informata pri la kialo de la neenmeto de lia **3**-*a artikolo en la "Diskutejo". Antaŭ ol ricevi tiun artikolon, la Direkcio estis jam de unu semajno decidinta ĉesigi la disputon. Tion atestas plej klare la protokolo de la Direkcio en ĝia kunveno de la 16. aprilo 1929. Ni supozas, ke K-do Drezen neniel pretendas, ke oni en "S-ulo" devas diskuti k ĉesigi diskuton kvazaŭ laŭ lia ordono. 3. Ni neniam estis informitaj, ke la "certaj Sovetiaj esp-istoj", kiuj proponis siatempe aliĝon de SAT al Komintern, konfesis publike sian eraron. Se tiel estas, ni kontente notas la fakton. 4. Se ne estas rezulto de malbona intenco la fakto, ke K-do Drezen en sia verketo "Elementoj de lingvoscienco, de historio k teorio de lingvo internacia (3-a parto)", ne citis la ĝustan nomon de nia organizo k donis al la vorto "unuecfronto" sencon etimologian k ne la nunan historian signifon, nu, ni same kontente enregistrus tiun aserton. Ni ankaŭ volas kredi, ke liaj vortoj presitaj sur la pĝ. 25 de la "Protokolaro", k kiuj estigis akran malaprobon ĉe kelkaj K-doj, ne entenas ian minacon al la unueco de SAT. La fakto, ke en la rezolucio voĉdonita en 1923 ĉe nia III-a Kongreso troviĝas la vorto "unuecfronto", ne povas pravigi la uzon de ĉi tiu esprimo nuntempe, tial ke ĝi tiutempe ne ankoraŭ akiris en socialistaj rondoj la hodiaŭan signifon.*

Ĉar la subskribintoj de la ĉi supra letero deziras, ke la Direkcio deklaru, ke ĉiam valoras la gvidprincipoj, kiuj ĝis nun estis aplikataj, ni tre volonte donas al ili plej firman certigon pri tio. La SAT-Direkcio ankaŭ volonte deklaras, ke ĝi neniam celis fari el "La Laborista Esperantismo" la programon de SAT. Kaj, ĉar la formo, laŭ kiu tiu verketo estas prezentita en la antaŭparolo, naskis miskomprenon, ni do konfesas mispaŝon tiurilate. Se en tiu antaŭparolo estas diro pri "kvazaŭa programo", tio ne rilatas al la V-a ĉapitro, kiu fakte staras tute ekster la kadro de programo. Hodiaŭ kiel hieraŭ, kiel ĉiam, la K-doj, kiuj opinias, ke la nacibatalo utilas al la emancipado de l' proletaro, havas la plenan rajton konfesi k defendi en SAT tiun vidpunkton. Per niaj rimarkoj al la programprojekto ni celis nur malhelpi, ke oni devigu ĉiujn SAT-anojn agnoski aŭ partopreni tian batalon.

DIREKCIO DE SAT.

La redaktoro de "Balkana Laboristo" denove arestita

Jam de pli ol du monatoj K-do Stefan Marinov, eksredaktoro de "Balkana Laboristo" kuŝas en la malliberejo. Pro enkarcerigo li malvarmumis k nun troviĝas en malliberejа malsanulejo. Lia vivo estas minacata. Sed nesufiĉas tio. La 16-an de junio estis arestata K-do Simeon Petrov, la nova redaktoro (oni arestis lin unuafoje la 21-an de marto kiel administranton de "B. L.").

Ne estas superflue mencii, ke tiuj arestoj estas ŝuldataj al la denuncoj de la centra komitato de la "neŭtrala" Bulg. Esp. Asocio, kiu ne povas toleri nian gazeton, ĉar ĝi sukcesis findetrui ilian faŝistan organizon. Sed la faŝistoj de BEA. sciu, ke la lab. esp-istoj en Bulgario estas fidelaj filoj de sia, kontraŭ ĉia oportunismo k neŭtralismo! Nek arestojn nek mortigoj igos nin forlasi nian vojon de veraj revoluciuloj k klini kapojn antaŭ la faŝista diktatoreco.

(4079)

SENNACIULA VIRINA PAĜO

Sub la kontrolo de Virina Sekcio de SAT. — Red. Adreso: Elma Adamson, Box 73, Göteborg, Svedio.

Prenu pafilon, K-dinoj!

Leviĝu, karaj K-dinoj! En kia situacio ni virinoj staras en la nuna socio? Ĉu virino havas homrajton egalan kun viro? Ĉu virino havas ĝustan salajron por sia laboro? Ĉu ni estas egale traktataj en ĉiu okazo de socia vivo, ekzemple, politike aŭ ekonomie? Ĉu ni proletoj havas liberon en parolado, skribado, legado kaj vidado? Ne, tute ne! Ne nian homan rajton ni proletoj havas.

Karaj K-dinoj! Ĉu ni ne aŭdas plendojn ĉiuflanke? K-dinoj, leviĝu, ekstaru kaj kunbatalu por akiri liberon kaj egalrajton!

Ĉiam mi parolas al K-dinoj tiel kaj serĉas kunbatalantinon. Iam, kiam mi laboris ĉe Kjoodo-presejo, mi sukcesis trovi dekkelkon da veraj kunbatalantinoj, kaj ni kune agis kuraĝe en kaj ekster la laborejo. Iam ni iris al malproksimaj lokoj aŭ vilaĝoj por helpi strikon aŭ por prepari aranĝon de laborista unuiĝo kaj propagandi nian ideon.

Nia unuiĝo havis sian ĉefoficejon en Kjoodo-presejo kaj la duan, trian, kvaran kaj kvinan taĉmentojn en diversaj lokoj, kaj ĝi radikale alvokis la popolon. Kelkaj unuiĝoj volonte unuiĝis kun nia, kaj fine la tutaj membroj de nia unuiĝo sumiĝis je 8000. Sed ve! la rememoro ankoraŭ dolore pikas mian koron kaj malamo al la kapitalisto neestingeble brulas en mia animo. Ni Gek-doj, kiuj laboras en Kjoodo-presejo, kontraŭstaris la presejestron pro la maldungo de iu K-do kaj malaltigo de salajro. Tio rezultigis grandegan strikon, kiu daŭris 60 tagojn.

La sekretarioj de nia unuiĝo estis sinsekve arestataj de policanoj kaj ĝendarmoj. Tio kune kun la monmanko, manko de batalkapitalo, malfortigis la kuraĝon de l' strikantoj. Edzinoj kaj infanoj de l' kunbatalantoj plendis, ploris pro malsato. Perdinte gvidantojn, multaj Gek-doj tute ne sciis kion fari. Pro troa malsato iuj devis vole nevole perfidi siajn kunbatalantojn kaj ree eniris la laborejon; kaj fine 50 aŭ 60 Gek-doj amase eniris.

Tage kaj nokte ni observis la perfidintojn unu post la alia. La kunvenejo de l' strikantoj estis atakata en noktomezo. Konsilantoj-K-doj unu post alia estis forkondukataj de policanoj aŭ friponoj dungitaj de la laborejestro por dispeli la strikantojn. Post la 60-taga batalo nia unuiĝo estis tiel mizere detruita, ke ni ne tuj povis rearanĝi ĝin. Gek-doj, kiuj batalis kun ni ĝis la plej lasta tago de la striko, disiris kun profunda neforgesebla malĝojo en la koro kaj forta malamo al la laborejestro.

Feliĉe mi tuj povis havi novan laboron, sed la nuna laborejo estas malgranda kaj kunlaborantoj estas malmultaj. Krome en tiu laborejo regas eksterordinara sistemo, sekve mia ĉiama klopodo neniam sukcesas. Mi perdis karegajn malnovajn kunbatalantinojn kaj ĝis hodiaŭ mi ankoraŭ ne scias, kie ili loĝas kaj kiel ili fartas. Mi daŭrigas la batalon por emancipo de l' proletaro kaj virinaro sklavigita.

Propagandi nian ideon estas grandega malfacilo, precipe inter virinoj, jam edukitaj laŭ kapitalisma principo. Ankoraŭ multe da virinoj obstine opinias, ke senkondiĉa obeemo estas la plej bona virto de virino. Malriĉa virino nur penadas forkuri de malriĉa vivado per edziniĝo kun riĉa sinjoro. Por serĉi riĉan sinjoron kiel sian edzon, kontraŭvole ŝi restas silenta ĉe kunveno de gesinjoroj, ĉar oni erare komprenas laŭkutime, ke silento estas bela virto de virino.

Maljunaj gepatroj ofte diras al sia filino, kiu estas en floranta aĝo: "Vi jam atingis la aĝon por edziniĝi. Vi ne devas elspezi por sensenca afero kaj devas aĉeti vestojn, zonojn kaj ornamaĵojn." Ofte okazas, ke malriĉa fraŭlino fariĝas edzino de riĉa sinjoro, se ŝi havas belan vizaĝon kaj povas bone kudri aŭ kuiri. Iu rigardas atente vian ĉiutagan agon; tial vi ĉiam estu vestita per bela vesto, kaj orde aranĝu vian hararon, ĉar vi nun estas vendaĵo. Eble vi ne volus tiel longe laboradi en fabriko, mi ankaŭ ne volas vin laborigi en malpura laborejo. Se vi edziniĝus kun riĉa sinjoro, vi ne bezonos iradi plu al laborejo. Vi povus pasigi libere ĉiun tagon tute laŭ via volo. Sed se malfeliĉe vi edziniĝos kun malriĉulo, vi devos laboradi vian tutan vivon. Ne nur vi, viaj maljunaj gepatroj ankoraŭ devas suferi pro monmanko ĝis la morto. Estu en ĉiu ago ĝentila kaj virineca, precipe al najbaroj!

Virino estas malforta kompatinda kreitaĵo, kaj tiel ne povas memstari ekonomie. Virino vivas nur en la amo de sia edzo. Estas tre feliĉa tra la tuta vivo tiu, kiu fariĝis edzino de riĉulo. — Nebone edukita kaj senscia fraŭlino fidele obeas al la vorto de siaj nesaĝaj gepatroj kaj agas laŭ iliaj vortoj. Tiele multaj virinoj junaj pasigas valoran tempon en sonĝo tute sensenca.

Ili deziras vivon senmonmankan kaj penadas forkuri el la malriĉa vivo, sed nur per edziniĝo, per helpo de aliaj. Tiel ili mem volonte sklavigas sin. Ili ne scias detrui sian mizeran situacion kaj trabati al si la vojon, kiu nin kondukos al brilanta, liberplena kaj egalrajta vivstato.

La vojo al tiel sopirata stato estas tre longa. Grandegaj ŝtonoj kaj rokoj ofte malhelpos nian antaŭmarŝadon, kruta vojo forte nin lacigos. Altan monton, grandegan riveron ni devos transiri. Sed tiaj malfaciloj, malhelpoj ne estas timindaj, kiam ni kuraĝe antaŭenpaŝos man' en mano kun kunbatalantoj.

Virinoj, ekprenu pafilojn kaj glavojn kaj batalu brave por konstrui nian novan socion!

Hisano Mijake, Tokio.

Ĉiutagaj gazetoj sciigis al la mirigita mondo:
"KANDID malpermesita en BOSTON (Usono) pro maldeca enhavo!"

KANDID

la ĉefverko de Volter
ĵus aperis ĉe SAT en la esperanta traduko de E. Lanti
kun ilustroj de R. Bartelmes.

Ĉiaj legantoj — en ĉiuj kontinentoj, ankaŭ en Usono — eltrovos la veran motivon, kial la Fulleranoj opiniis oportune malpermesi ĉi tiun libron en sia ŝtato!

162 pĝ. — Formato: 13×19 cm.
Prezo: **1.70** mk. g.

Mendu ĉe Administracio de SAT, Colmstr. 1, **Leipzig O 27.**

Ĉu la virino devas panakiri?

En la tuta mondo laboras la virino preskaŭ en ĉiuj industribranĉoj kaj profesioj, ekz. kiel teksistino, instruistino, fiegistino, guvernistino, servistino, vendistino, tabaklaboristino ktp.

Ni disputis pri la temo, ĉu la edzino devas panakiri? Kompreneble estas, ke la fraŭlinoj panakiras, ĉar la gepatroj ne estas devigataj zorgi pri la knabinoj ĝis ilia dudeka jaro. Ĉu la okupo de la virinoj en la industrio estas pli multe malutila ol utila por la ekonomia situacio de iu lando, mi pridubas.

Ĉi tie disiĝas la opinioj mem de la virinoj. Oni diras, ke la virino laboras pli malmulte — koste ol la viro. Se la edzino ne laborus, la entreprenisto estus devigata pli bone pagi al la viroj. La edzino kaj patrino apartenas en la mastrumo al la infanoj kaj devas zorgi pri la komforto de la edzo.

Laŭ mia opinio ankaŭ la edzino devas panakiri. Per tio la perlaboro de la familio estos la duobla; sekve de tio la financa stato estos pli bona, la konsumo de tia familio povos esti granda, la industrio, eĉ la laboristo gajnos, ĉar devos esti pli produktata. Nur la mizerego malpacigas inter la familianoj, ne la laboro. Edzinoj, kiuj mem panakiras, pleje pli bone komprenas la valoron de organizo, ĉar ili sentas la penon de la kunlaborado en la organizo. La edzino en la mastrumo ne komprenas, ke unuigitaj fortoj kondukas al la celo, kaj la virino ĉesos esti la ekspluatata objekto de la entreprenisto.

Kian opinion vi havas pri tio, K-dino?

2019, Hallein.

La francaj instruistinoj

En Francio, ni ricevas pedagogian preparon saman, kiel niaj kolegoj instruistoj, kaj tiuj el ni, kiuj oficas en lernejoj por tre junaj infanoj ricevas salajron saman, kiel ni.

Nur post batalo dum 10 jaroj kaj eĉ pli longe, ni sukcesis eltiri — kiel favoron de l' mondmilito — la salajregalecon (kun la instruistoj), kiun kontraŭ-

TRA ESPERANTIO

Ĉu revolucio en la esperanto-movado?

Dum pli ol kvardek jaroj laboris la esp-istoj. La venko tamen ne estas senduba. Venis en la mondon faktoroj tiaj, kiaj radio, parolfilmo, kaj estonte venos ankoraŭ similaj. Kelkaj el ties aŭtoritatoj favoras esp-on. Sed ĉar la praktikaj malfaciloj tuj akcepti tiun lingvon estas grandaj, oni ŝajnas esti decidinta komenci altrudi nacian lingvon kun tre simpligita dialogo en la parolfilmon. Aŭ oni malsukcesos, aŭ oni sukcesos igi ĉiujn filmoficejojn fari siajn filmojn en ia normigita angla-amerika lingvo. La lasta alternativo estas tre malmulte kredebla. Sed certe la homaro bedaŭrus fariĝi tute amerikanigita.

Tamen, esp-o devas venki nun tuj, se iam ajn, aliel oni ne povos ĝin proponi nek al parolfilmo, nek al internacia radio, nek al telekompostata internacia gazeto, nek al radiokino, nek al aliaj mirakloj de estonta kaj estanta tekniko, kaj el tio sekvus, ke ankaŭ ne al la vasta publiko dum longa tempo.

Tial enkonduku jam dum la venonta vintro la lingvon tiom, ke poste ne plu necesu ĝin propagandi; tiom ke ĝia fina venko estu ekster dubo antaŭ kiu ajn!

Estas ebla tion fari, nur necesas montri kiel. Jene la montro!

La problemo havas kvar ĉefajn flankojn: Reklama, instruada, organiza, lingva.

Por la instruado ni havas la bonan ĉe-metodon. Sed ne estas sufiĉe da instruistoj. Necesas do trovi kaj eduki tiajn! Kie ilin trovi? Mi diras: Precipe ĉe universitatoj kaj popolinstruistaj seminarioj. Ne ĉiu ajn povas trovi tempon ktp. fariĝi Ĉe-instruisto, nek ĉiu ajn taŭgas. Tia instruisto ja devas havi iujn specialajn kvalitojn, kaj li devas esti en tiaj cirkonstancoj, ke li havas sufiĉan liberecon forlasi sian landon por sufiĉe longa tempo. Instruisto laŭ Ĉe-metodo certe devas esti partopreninta Ĉean kurson, li ankaŭ devas havi la rekomendon de s-ro Ĉe mem aŭ de persono, kiun li rajtigis tiajn transdoni. Sed kelkaj kvalitoj pli frue necesaj povas esti elimineblaj per tiu simpla fakto, ke alia persono povas havi en pli alta grado tiujn kvalitojn, kion tuj mi montros.

Al la internaciaj esp.-kongresoj venas ĉiujare miloj da esp-istoj, inter ili la plej kapablaj kaj konataj. Tie do oni aranĝu kursojn por instrui la Ĉe-metodon al interesuloj kaj kapabluloj; kaj ne nur la kurson instrui, sed ties instruadajn principojn, kaj oni ekzamenu je tio. Kiuj montros perfektan talenton, do ricevos sian instruistan rekomendiĝon. Eble ne estas en ordinara internacia esp.-kongreso tre granda elcento da personoj taŭgaj, sed informite pri la kurso certe venos sufiĉe da ili. Por instrui al personoj jam perfektaj en la lingvo mem, la kurso povus esti koncentrata en unu semajnon. Do: Ni diru, ke al pedagogiaj kongresoj en Ĝenevo kaj en Helsingör, SAT-kongreso en Leipzig, Budapesta kongreso kaj aliaj venos kelkcent personoj kapablaj lerni kaj poste apliki la metodon, kiuj tiaokaze ricevos de s-ro Ĉe aŭ lia anstataŭanto la instruistan rekomendiĝon. Ioma nombro el la novaj instruistoj estos gravuloj, la aliaj ne. Ŝajnas, ke ĝis nun oni konsideris eminentan titolon kiel ion nepre necesan. Sed, kiel jam dirite, oni tion evitos farante aliel des pli lertan reklamon. Inter studentoj, seminarianoj kaj junaj, viglaj laboristoj estas multaj, kapablaj fariĝi sukcesaj instruistoj laŭ la jam ellaborita metodo, sed ne sufiĉe spertaj, famkonataj aŭ lerte adaptiĝemaj por sukcese prepari la kursan grundon.

La reklamo estas gravega. Per ĝi la famo pri esp-o venkos la indiferenton tra la diversaj landoj, tiel, ke oni eĉ povos baldaŭ havi multloke tre sukcesajn kursojn sen loka propagando. Ankaŭ tiel oni ŝparos la propagandistojn kaj famulojn.

La reklamo efektive donos la precipan ekonomian bazon por la militiro, ĉar ĝuste la reklamo igos la homojn pagi la necesajn kostojn kaj ĝi donos al ili la necesan intereson. Granda, bona gazetanonco, kiu alportos dekon aŭ pli da aliĝoj, pagiĝos per 2—3 kurskotizoj. Tamen gazetanoncoj estos malĉefa parto de la reklamo. Oni devas agi kiel ĉiam tre saĝe. Kial la esp-istoj, kiuj jam lernis la lingvon, devas tiom multe kaj senprofite labori por ĝi? Estas, ĉar la publiko, kiu ja havos la profiton, ne estas sufiĉe interesita. Tial, unu ĉefprincipo estas: Igu aliajn pagi la reklamon kaj fari ĝin: Ellaboru zorgan planon por tio. El Svedio oni havas jam spertojn; kompreneble oni tiujn profitos. Por tiu lando estas ankoraŭ konsilindaj kelke da aferoj. Jen unu: Ekzistas lekci-societoj ĉie en la lando. Ili bone pagas por interesaj lekcioj, sed necesas interkonsenti jam en junio aŭ kiom eble plej frue pri lekcioj okazontaj dum aŭtuno aŭ vintro. Sed prefere kun la societoj mem aŭ kun ties propraj estraroj, ne kun iliaj landaj aŭ distriktaj estraroj. Do necesas trovi la adresojn. Ĝenerale: Estas necese trovi ĉiujn informojn pri la lekciaj organizoj en la lando kaj pri ĉiaj kaj ĉiuj kondiĉoj rilate ilin. Same pri laboristaj, kamparanaj, idealistaj kaj klerigaj organizoj ĝenerale. Estas ja ĝuste tiaj organizoj kiaj plej ofte organizis la esp.-lekciojn. Sed kutime ili fiksas sian programon almenaŭ kvaronjaron anticipe. Tial la antaŭfiksita programo plejofte malhelpas la aranĝadon de lekcio, kiam proponiĝas esp. oratoro. Necesas do organizita interrilatado jam dum somero kun abstinencaj, laboristaj ktp. societoj, ABF (Laborista Kleriga Asocio, Svedio), kaj cetere ĉiuj. Sciiĝi pri esp-istoj, kiuj rilatas iel al tiaj organizoj kaj informiĝi kiel profiti tion. Grava nova kampo estu la kamparanaro kaj ties organizoj.

Kiel estas alilande? Do kolekti en la tuta mondo informojn pri ĉiuj propagandmetodoj aŭ propagandeblecoj uzataj aŭ uzeblaj en ĉiu aparta lando laŭ ties karaktero. Pri ĉiu lando aparte oni studu la plej sukcesigan vojon kaj informiĝu pri la diversaj aferoj profiteblaj. Por ricevi la necesajn informojn kiom eble rapide, certe kaj malmultekoste, estus plej bone sin turni al la diversaj landaj federacioj esp-aj kaj al la plej agemaj perantoj aŭ delegitoj de mondfederacioj esp-aj.

---

staris ne nur registoj, sed ankaŭ grandnombra parto de la vira instruistaro. Sed ni estas la solaj ŝtatoficistinoj, kiuj ĝuas tiun avantaĝon pri salajro egala al la vira. Tamen tiu egaleco estas perfortita en kelkaj punktoj: kiam instruisto mortas, lia edzino ricevas parton de la pensio — sed kiam mortas instruistino, lia edzo ricevas nenion (kvankam ŝi pagis por pensio elcenton saman, kiel instruisto).

Certe ni havas rajton edziniĝi kaj ni ne povas imagi, ke oni malpermesas tiun rajton en kelkaj landoj. Por ĉiufoja patriniĝo (akuŝo) ni ĝuas pagatan libertempon de 2 monatoj (1 monato antaŭ akuŝo kaj 1 monato poste), sed ni opinias, ke tio estas nesufiĉe longa.

En Francio, virino ne rajtas voĉdoni. Sed ni partoprenas vigle en la socia batalo: multaj el niaj K-doj estis kondukataj al tribunaloj, estis punataj per altaj monpunoj, estis ĵetataj en malliberejon pro sia agado pacifista, politika, sindikatista kaj socia.

Ni batalas flanke ĉe flanke de niaj laboristinoj-K-dinoj, por ke oni apliku al ĉiuj virinoj la justan principon: "Por egala laboro, salajron egalan!" Ni luktas por libera patriniĝo (eksterleĝa), por ke patrineco estu konsiderata, kiel socia funkcio ŝtate kaj tute monsubtenata; pro tio jam oni persekutis nin per kelkaj procesoj kaj monpunoj. Ni luktas por la mizera infanaro — kaj ĉefe kontraŭ milito. Ni estas decidaj radikalaj kontraŭmilitaristinoj. Ni rajtas deklari, ke nia propagando efikas.

Kaj vi, ĉiulandaj edukistinoj, kia estas via situacio? — kiujn rajtojn oni rifuzas aŭ limigas al vi? — Kia estas via agado? Respondu al nia perantino:

Marthe Planchon, 30, Avenue de la Somme Sucy-en-Brie (Seine-et-Oise), Francio.

Feministinaj Grupoj
el Ruĝa Franca Geedukista Federacio.

KAMARADINOJ!

La Virina fakkunsido ĉe la 9-a SAT-Kongreso okazos mardon, la 6-an de aŭgusto, je 19-a horo en la Popoldomo Leipzig. Ĉeestu multnombre!

La post tio sekvontaj, kiom eble plej multflankaj, propagando kaj reklamo kreos fortegan intereson al esp-o; la homoj volonte venos al la kursoj; ĉie oni deziros kursojn kaj venos multe da mono en la kasojn. Tiel oni eĉ havos monon por sendi la plej sukcesajn lernintojn al la Ĉe-instruista "seminario". Mi kredas, ke el ĝis nun okazintaj Ĉe-metodaj kursoj estas eble elekti ioman nombron da homoj, kiuj ankoraŭ dum kelkaj tagoj vizitus tian migrantan seminarion (Ĉe-instruiston) en propra aŭ proksima lando.

Nun, unue aranĝi kun la ĉiulandaj lekciantaj, klerigaj ktp. organizoj same kiel kun lernejoj kaj instruadaj direkcioj pri alveno de eksterlandaj lekciistoj famaj kaj el landoj plej diversaj. El tiuj estos kelkaj instrukapablaj, aliaj ne. El la instruistoj estos kelkaj tre taŭgaj por propagandi, aliaj malpli. La du lastaj specoj el ambaŭ kategorioj povas esti sambonaj kiel unuaj el la vidpunktoj de specialigo kaj reciproka helpo.

Poste oni ne forgesu organizi la novulojn, kio signifas: Forte ligi ilin al tiu intensigita movado, por ke ili helpu kiom eble plejmulte.

La unua, kiel ĵus dirite akirebla, nova instruistaro eniru la jam preparitan kampon plejlaste 1-an de oktobro. Por ekonomie bonsukcesi ĉiu kurso, aranĝata je pluraj grupoj samtempaj, devas havi ioman ne tro malgrandan nombron da partoprenantoj, en Svedio ĉirkaŭe 100. El tiuj iru en "seminarion" ioma elcento. Ili estos pretaj post unu-du semajnoj. Ankaŭ kelke da novaj propagandistoj — — — sed ne tre necese, ĉar la kursoj finitaj estos ankaŭ bona propagando per si mem. Cetere eksteruloj vidos el la ekzemploj, ke ili povos profite uzi esp-on por lekcioj en eksterlando, kaj faros tion.

Ĉiu kurso (kun *20—24* lecionoj) postulas meze du monatojn. Mi volas ĉi tie fari matematikan eksperimenton. Se **a** = la nombro da Ĉe-instruistoj je 1-a de okt., **b** = la meza nombro da kursanoj po kurso, **c** = la meza elcento da novaj instruistoj el ĉiu kurso, tiam estos post **n** sinsekvaj kursoj (kursperiodoj) en la tuta mondo la nombro N da novaj lernintoj jene donata:

$$N = ab + \left(\frac{cab}{100} + a\right) b + \left[\frac{cb}{100}\left(\frac{cba}{100} + a\right) + a\right] b + \ldots$$

kaj, se oni skribas $q = \frac{cb}{100}$

$$N = ab\left[1 + q + 1 + q(q+1) + 1 + q\{q(q+1) + 1\} + 1 + \ldots + \ldots + 1\right]$$

kio sumigite donos: $$\boxed{N = \frac{ab}{(q-1)^2}\left[q^{n+1} - (n+1)q + n\right]}$$

Ĉiu, kiu deziras, povas meti anstataŭ la simboloj a, b, c, (q) kaj n, tiujn ciferojn, kiujn li konsideras plej gustaj aŭ kiujn li volas, kaj ricevas tiel la nombron da lernintoj post kiu ajn tempo, supozite, ke neniu mortas kaj ke neniu instruisto cedos. Kiel konate la Ĉe-metodaj kursoj havas tiun gravan diferencon de aliaj, ke ili finiĝas kun proksimume sama nombro da homoj, kun kiom ili komenciĝis.

Tiel estos kun a = 100, b = 100, c = 3 post unu jaro (n-4) 580 000 kaj post tri jaroj 3 985 740 000 da novlernintoj.

Interesuloj, kiuj nek kapablas (aŭ deziras) esti propagandistoj, nek esti instruistoj, havos ankaŭ multan kaj gravan laboron. Ili devos organizi tiel, ke la afero sukcesu, sukcesegu kaj — grave, tre grave — donu bonan profiton kaj al la organizintoj kaj al la afero entute. Tre grave estas, ke la laborantoj ricevu bonan profiton, ĉar homoj, kiuj volas labori por iu afero ne ricevante profiton, ne ekzistas ĉie en tiom granda kvanto, ke oni povas sur ili konstrui sian esperon — Ne! K o n v i n k o n ! — Ne! sed: g a r a n t i o n !

Alia flanko estas la lingva. Necesas multe da literaturo en tiom rapidkreska movado. La lingvo mem devos kunrespondi al la rapide alvenontaj novaj kaj pli grandaj postuloj. Multaj devos labori je verkado, tradukado, lingvaj laboroj ktp.

Tiel, la venontan jaron la lingvo estos veninta en tiom fortan marŝon, ke jam nenio povos ĝin haltigi. La esp-istoj ne havos plu zorgojn pri propagando, ĉar la aŭtoritatoj de instruado devos vole-nevole daŭrigi la disvastigon, pro tio, ke ĉiu homo volos la lingvon lerni kaj postulos la instruiĝon.

Ĉi tiu plano kredeble ŝajnas tre vasta kaj malfacile efektivigebla, sed rilate Svedlandon ĝi ne prezentas maleblecon. Se la malfaciloj estas venkeblaj ĉi tie, ankaŭ oni povos sukcesi sambone alilande, ĉar laŭ ĝenerala vidpunkto aliaj landoj multaj ne estas pli malfavoraj ol Svedlando.

8404 (Aranĝinto de Ĉe-metoda kurso).

Ĵus aperis kiel 8-a volumeto de "Biblioteko de Sennaciulo"

Leo Tolstoj

ĤODINKA

Du rakontoj de la fama verkisto, ilustritaj per reproduktoj de artpentraĵoj. Kun enkonduka artikolo de K-do N. Modenov kaj skizo de Akademiano V. Friĉe pri L. Tolstoj kiel moralisto.

64 pĝ. Prezo: **0.60** mk. g.

Administracio de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O 27. En Sovetio: CK de SEU, Poŝtkesto 630, Moskvo.

BATALO SUR LA LINGVA KAMPO

(Leningrad)

Observado de laboro pri internacia laborista kunligo en entreprenoj de Volodarskij-urbparto, kiu daŭris tri tagojn (4.—6. junio), konstatis tre ĝojigan por nia movado fakton: 95% da eksterlanda materialo, presita dum la vintra periodo en la fabrik-laborejaj presgazetoj, estas esperantlingva.

Alia ne malpli ĝojiga fakto estas, ke la internacia laborista kunligo havis grandan sukceson, vivkapablon, konstantecon kaj regulecon nur en tiuj entreprenoj, kiuj estis priservataj de l' esp. rondetanoj aŭ helpataj de apartaj fervoraj esp-istoj-aktivuloj, kiuj sukcese aranĝis la aferon pri kunligo.

La nombro da landoj, kun kiuj estis starigata rekta (senpera) konstatanta kaj regula kunligo p e r e s p e r a n t o, atingas la ciferon 13, per t r a n s d o n a j i n s t a n c o j ("Rabselkor", "Leningradskaja Pravda") — nur 3.

Ĉi tiuj tri faktoj treege ekmalplaĉis al reprezentantino de "Leningradskaja Pravda". Ĉi tiu ĉeestis kunvenon de labkor-oj de la urbparto (7. 6.), dum kiu tre longe estis diskutata la demando pri internacia lab. kunligo.

En sia parolo ŝi penis pruvi pli grandan utilon de l' internacia lab. korespondado per la transdonaj instancoj, kie — ŝi diris — por priservi la laboristojn, dezirantajn starigi internacian kunligon, sidas speciale tiucele difinitaj tradukistoj.

La reprezentantoj de l' fabrikoj kaj laborejoj, en kiuj la internacia lab. kunligo estas sufiĉe forta, subtenis ne ŝin, sed la raportinton pri la observado, notinte tre malĝojan por ŝi fakton, ke la respondoj al la leteroj, senditaj per la transdonaj instancoj, ofte ne venas, aŭ venas trioble pli malfrue, ol la respondoj ĉe la senpera peresp-a kunligo.

Konatiĝinte kun la fakto, ke la internacian korespondadon kun multaj landoj senpere partoprenas simplaj laboristoj (ne poliglotoj), ellernintaj esp-on dum 6—7 monatoj, la ĉeestintaj labkor-oj definitive ekstaris sur la flankon de l' senpera, pli rapida peresp-a korespondado kaj esprimis la deziron ekposedi la interkomprenilon, kiu liberigos ilin de l' tradukistoj kaj ebligos al ili havi interligon kun la tuta mondo. Tion ja ne sukcesis fari la lingvo-monopolistoj, sidantaj en la internacia sekcio de l' labkor-a klubo ĉe "Leningradskaja Pravda", kiu estis devigata inviti por la internacia lab. kunligo ankaŭ unu el la plej aktivaj esp-istoj (K-don Tilin[1]).

Malgraŭ la evidenteco, ke por la kunligo la plej taŭga rimedo estas esp-o (pri kio atestis bone elektitaj ekspozaĵoj de eksterlanda esp-lingva materialo), la reprezentantino denove prenis parolon penante konvinki la aŭskultantojn, ke pli grandan utilon al la labkor-oj donos la lernado ne de esp-o, sed tiu de l' germana, franca, angla kaj de aliaj lingvoj.

"Kial do anglaj aŭ francaj laboristoj ne lernas la rusan lingvon?" estis farata al ŝi demando.

[1] Mi timas, ke la laboro de K-do Tilin estonte estos atribuata al si de la poliglotoj.

9-a Kongreso de SAT

en Leipzig (Germ.) 4.—10. aŭg. 1929

13-a listo de aliĝintoj

551 Willi Tittmann, Chemnitz, Germ. 2995
552 P. Kramer, Chemnitz-E., Germ.
553 Gertrud Klimpel, Zittau, Germ. 8596
554 Ernst Seyfert, Zittau, Germ. 14784
555 Fritz Schmalz, Zittau, Germ. 14360
556 Paul Klauss, Riesa, Germ. 13704
557 Ernst Hanisch, Thalheim, Germ. 8288
558 Alzinger, Regensburg, Germ. 7537
559 Anisimov Grigori, P. Kosturi, Sov. 10907
560 Herm. Müller, Braunschw., Germ. 8571
561 Wilh. Kroma, Braunschw., Germ. 14371
562 Wilhelm Kröning, Kassel, Germ. 4630
563 Willi Eckert, Dresden, Germ. 13477
564 Aleksandro Pencik, Slavjanski kurort, Sovetio 11424
565 Petro Fedorenko, Misovaja Zabajk, Sovetio 14795
566 Moseo Rejtman, Krivoj-Rog, Sov. 14577
567 Petro Vasiljov, Lugansk, Sovetio 13915
568 Albert Wiener, Katovice, Polio 14801
569 Jean Villard, Miallet, Francio 11774
570 X.
571 Tage Olsson, Bromölla, Svedio 14793
572 Vladimir Kuzmiĉ, Ĥarkov, Sovetio 3975
573 Charles Adamson, Liverpool, Angl. 13158
574 Wilh. Schneider, Sulzgries, Germ. 5488
575 August Kleiner, Weissstein, Germ. 5135
576 Ake Olsson, Bromölla, Svedio 14355
577 Herm. Uschner, Dresden, Germ. 4625
578 M. M. Weber, Denver, Usono 5934
579 I. M. Kerr, Denver, Usono 1781
580 Harry Butscher, Sheffield, Anglio 11440
581 Paul Gedai, Halle a. S., Germ. . 493
582 Willy Böhm, Mainz, Germ. . . 426
583 Jac. Braukmann, Amsterdam . . 12 707
584 A. E. J. van Trotsenburg, Amsterdam 12 720
585 Gerhard Aster, Leipzig, Germ. . 14 806
586 Helmut Schulz, Siegmar, Germ. . 11 595
587 Erhard Geissler, Chemnitz, Germ. 12 991
588 Karl Kämpfe, Rabenstein, Germ. 3 535
589 Walter Zinke, Chemnitz, Germ. 1 305
590 Fritz Reuther, Siegmar, Germ. . 1 667
591 Willy Lorenz, Rabenstein, Germ. 1 403
592 Bruno Plache, Leipzig, Germ. . . 12 933
593 Alois Ramschack, Loeben, Aŭstr. 10 504
594 Ph. Neumann, Buer-Hassel, Germ. 8 869
595 Alwin Sommer, Hagen, Germ. . 10 865
596 Anton Lang, Augsburg, Germ. . 14 069
597 Fr. Hartig, Hartmannsdorf, Germ. 14 746
598 Wilhelm Brauser, Berlin . . . 14 166
599 Erich Rahn, Berlin 13 443
600 Ernesto Drezen, Moskvo . . . 1 518
601 Walter Zentner, Berlin, Germ. . ?
602 Erich Ziegenhain, Barmen, Germ. 10 322
603 Oskar Oeser, Nürnberg, Germ. . 14 594
604 Osw. Bernhard, Limbach, Germ. 10 593
605 Hilari Ŝpidbaum, Varsovio, Polio 14 419
606 Osk. Herbrich, Warnsdorf, Ĉekosl. 14 521
607 Rud. Patzelt, Warnsdorf, Ĉekosl. 12 767
608 Karl Krause, Warnsdorf, Ĉekosl. 9 124
609 Hildeg. Vietze, Warnsdorf, Ĉekosl. 9 844
610 Anna Fröhlich, Warnsd., Ĉekosl. 9 839
611 Aleks. Georgiev, Svilengrad, Bulg. 13 173
612 Anton Spitzenstätter, Innsbruck 14 551
613 G. Ludwig, Reichenberg, Ĉekosl. 696
614 G. Kuzmenko, Kapitanovka, Sov. 8 911
615 V. Musienko, Odessa, Sovetio . 14 476
616 Benciono Berin, Gomel, Sovetio 11 193
617 Filip Ryĵij, Poltava, Sovetio . . 1 121
618 Nikolao Kuŝnirenko, Poltava, Sov. 14 116
619 S. M. Koĵaev, Elektroperedaĉa, Sovetio 10 779
620 Konst. Sidoroĉev, Kerĉ, Sovetio 12 249
621 Lorenko Pirĝnikov, Kerĉ . . . 13 900
622 Petro Klepikov, Stretensk, Sovet. 13 271
623 Dem. Pogorelov, Ĥarkov, Sovetio 5 403
624 Nikolao Davydov, Perova, Sovet. 12 963
625 Pan. Vasilĉenko, Krasnodar, Sov. 5 712
626 Aleks. Hoĥlova, Krasnodar, Sov. 13 121
627 Bernhard Peuker, Breslau, Germ. 11 855
628 Fr. Tillart, Amsterdam 13 595
629 Charlotte Huggins, Peterborough 14 821
630 V. Makarin, Ivanovo-Voznesensk 11 220



Originalo de la Kongres-insigno, ruĝe enkadrigita.

Ĉiu kongres-aliĝinto, kiu ne povos veni al la 9-a SAT-Kongreso, senpage k afranklibere ricevos post finiĝo de la Kongreso la kongresan insignon (kiu estos kvinkolore brodita, ne nur metala kiel anoncita en antaŭaj n-oj de "S-ulo", do des pli valora memoraĵo) k la programlibron en amplekso de 48 paĝoj.

Tuj kongresaliĝu!

631 Walter Bräuer, Dnepropetrovsk 10 513
632 Andreo Marti, Dnepropetrovsk . 13 528
633 B. Ŝipilith, Dnepropetrovsk, Sov. 9 131
634 P. Visockij, Dnepropetrovsk, Sov. 4 357
635 Nikolao Ĉertovskoj, Arĥangelsk 14 397
636 Aleks. Erjuĥin, Arĥangelsk . . 9 682
637 Isaak Hoves, Arĥangelsk . . . 14 822
638 Aleks. Rusakov, Moskvo . . . 12 855
639 Vitalo Anonimov, Kazan, Sovetio 5 112
640 Hipolit Bojanowski, Kazan . . . 9247
641 Nikolao Skarjatin, Kazan . . . 13 857
642 Paul Ĥozov, Barnaul 11 173
643 Nikolao Ŝĉogelev, Barnaul . . 13 503
644 Otto Kretschmar, Meissen, Germ. 8 204
645 W. Hertel, Meissen, Germ. . . 3 957
646 Otto Zieger, Meissen, Germ. . . 6 666
647 Alfred Erler, Meissen, Germ. . . 8 035
648 Erich Kunze, Leipzig, Germ. . . 13 285
649 Anna Medvedeva, Ivanovo-Vozn. 6 321
650 Lini Rahlf, Dortmund, Germ. . . 14 358
651 Franz Hilberg (migradas) . . 10 739
652 Dietrich Keuning, (migradas) . . 10 743
653 Hilde Falkenherr, Dortmund . . 13 563
654 Betti v. d. Heid, Dortmund, Germ. 13 562
655 Alfr. v. d. Heid, Dortmund, Germ. 61
656 Albert Fluder, Dortmund, Germ. 10 746
657 Hermann Lichtenberg, Dortmund 14 804
658 Anna Lichtenberg, Dortmund . . 14 805
659 Franz Gerboth, Dortmund, Germ. 7 729
660 . . . . 8 070
661 W. Engler, Crimmitschau, Germ. 5 855
662 Oskar Grimm, Stuttgart-Unterth. 929

Donacoj

Riedermeier-Augsburg 1.— mg.; Stangl-Augsburg 1.— mg.; Freund-Freiburg 1.— mg.; Behrendt-Berlin 1.— mg.; Neuwirth-Bregenz —.70 mg.; Uschner-Dresden 1.50 mg.; Nagy-New York 4.— mg.; Schneider-Sulzgries 1.— mg.; Kleiner-Weisstein 1.— mg.; Lang-München 2.— mg.; Zinke-Chemnitz 2.— mg.; Weihmann-Leipzig 10.— mg.

Ne sukcesinte pruvi sian pravecon, la reprezentantino lastfoje turnis sin al la kunvenintoj, dirante: "La internacia lab. kunligo per helpo de l' transdonaj instancoj estas grava tiurilate, ke ĝi ebligas registri la materialon, rilatantan al la kunligo."

"Ni ankaŭ registras ĉiun ricevatan kaj forsendatan leteron", estis la respondo de l' fabrik-reprezentantoj..."

Nur 5% de l' eksterlanda materialo "rikoltis" sur la kampo de l' internacia lab. korespondado la poliglotoj, por kiuj la plej terura malamiko estas esp-o pli profunden penetranta en la tutmondan laboristaron.

P. Lisicin (5333), Leningrad.

Porkongresa Raportaro

Edukada serio de "La Nova Epoko"

La edukada serio de "La Nova Epoko" regule disvolvis sian laboron en lasta jaro, prezentante kvar kajerojn kun enhavo ĉirkaŭanta difinitan temon "interesocentran".

Certe niaj plej efikaj kajeroj estas tiuj, kiuj prezentas riĉan informaĵon utilan al proletaj edukistaj organizoj — kvankam ni opinias ankaŭ utilaj kaj necesaj la artikolojn, kiuj prezentas "inter ni" vulgarigan edukmaterialon por SAT-edukistoj. Tiun duoblan vojon penas sekvi la gvidantoj de l' eduka serio de "La Nova Epoko".

En jaro 1927—28, nia plej efika kajero estis tiu pri "Historio de Eduk-Intern kaj Pedagogiaj Tagoj en Leipzig", kiu forte impresis la rondojn de Edukintern kaj la sovetan edukistan gvidantaron.

En 1928/29, niaj plej efikaj kajeroj estis tiuj pri novaj edukaj teknikoj (kino, radio, preso), kiuj liveris abundan materialon el preskaŭ nur esperanto-deveno, elĉerpitan el internacia materialo de la grava ukraina gazeto "Vojo de Klerigo" kaj de l' esperanta pedagogia servo TEPS.

En 1929/30, la edukaj kajeroj prezentos ankoraŭ pli sisteman utiligon de l' esperanto-materialo prilaborita de SAT-edukistoj, de TEPS-anoj kaj de kunlaborantoj al "Vojo de Klerigo" — en celo pliaktivigi la faklaboron ĉe la SAT-edukistoj. Sed ĉar ni konscias, ke multaj legantoj de "La NE" ne estas profesiaj edukistoj, ni penos prezenti legaĵon pli vulgaran kaj socian (Gepatroj kaj kuracistoj helpe al edukistoj — Sociaj flankoj de soveta lernejo). Laŭ iniciato kaj per helpo de K-do Zilberfarb, ni kuraĝoplene turnis nin al eminentaj sovetiaj pedagogoj, petante ilin verki artikolojn por aparta numero de nia revuo. Kuraĝe ĵetante nin en la mezon de la batalanta edukistaro, ni devigas la eksteran mondon atenti nin kaj konsideri nian laboron utila kaj serioza.

La grava laboro plenumata de — bedaŭre nur kelkaj — SAT-edukistoj, jam instigis la gazeton "Vojo de Klerigo" eldoni bibliografian resumfolion. Ni povas aserti, ke la seriozeco de l' edukaj kajeroj de "La NE" estas unu el la kaŭzoj, kiuj instigis la Tutsovetian Geinstruistan Unuiĝon eldoni por sia tutmonda propagando apartan esperanto-organon "Soveta Pedagogia Revuo", kies unua numero ĵus aperis, kun tradukhelpo de SEU.

La internacia faklaboro de la SAT-edukistoj jam montras neceson krei apartan pedagogian SAT-gazeton. Bedaŭre, la gvidantoj de la SAT-edukista sekcio (K-doj Stay, Starr, Zilberfarb, Boubou, Klys, Sneĵko, Ĵuskoviĉ...) plendas, ke ne sufiĉe multaj K-doj partoprenas la faklaboron. Pli frue ol post du jaroj, la SAT-edukistoj nombros mil. Ili ĉiuj abonu "La NE" (sekcian ligilon), ili sekvu la ekzemplon faklaboran de siaj gvidantoj — kaj post nelonge SAT havos propran edukan organon kaj konkiros al internacilingva praktikado la proletedukistajn amasojn el tutmondo.

M. Boubou.

Proponoj al la 9-a Kongreso

(Daŭrigo)

12.

Mi proponas enstatutigi jenan tekston: "La salajro de la dungitaj oficistoj de SAT estas fiksata de la tuta SAT-anaro per ĝenerala voĉdono. La Plenum-Komitato nur rajtas proponi al la membraro diversajn salajrojn. Ĉe tia voĉdonado la oficistoj ne rajtas kunvoĉdoni." Do estu forstrekataj el la Regularo pri funkcio de la Pl. K. a) Tasko, paragrafo 4, la vortoj "kaj difini al ili salajron". Plie estu ie enstatutigota la frazo "Ĉiu aktiva SAT-ano rajtas scii, kiom da salajro ricevas la unuopaj dungitoj de SAT."

S A T - a n o (6707).

13.

La Kongreso diskutu kaj, se eble, decidu, ke iam (eble post du aŭ tri jaroj) okazu SAT-Kongreso en ekstereŭropa lando, ekz. Alĝerio, Siberio aŭ iu alia lando de Azio.

S A T - a n o (6707).

14.

SAT starigu libroservon kun filioj ĉiulande, eldonu plenan katalogon de nun ricevebla esp. literaturo, konsentu la kutiman 20%-an rabaton al studrondoj k propraj membroj, indiku la sen-taran prezon en la katalogo k tion faru ne nur pri propraj eldonaĵoj.

F r i t s L i n d é n (8404).

Al niaj sovetiaj Gek-doj!

Pasis jam kelke da monatoj, de kiam ni ne plu prilaboris la mendojn el Sovetio tuj post rekta skriba avizo, sed atendis, ĝis ni ricevis la listojn de nia Moskva agentejo. Tiu ĉi procedo pruvis al ni, ke ĝi ne taŭgas, ĉar la Moskva agentejo ofte kun 3—4-semajna prokrasto sendis al ni la listojn. Ni ne povas kompreni tion, sed tre verŝajne nia K-do Demidjuk ankaŭ estas tro ŝarĝita per laboro.

Por estonte aliigi ĉi tiun staton, ni decidis en la Adm. instali por ĉiu loko konton kurantan, por ke ni tuj povu prilabori ĉi tiujn mendojn. Estas ankaŭ nepre necese, ke la K-doj senprokraste kun la mendo sendu la monon al nia agentejo, por ke ne okazu, kiel pli frue: Oni skribis: "Samtempe mi sendas la koncernan sumon al via konto de CK de SEU", sed fakte oni forgesis sendi ĝin aŭ oni sendis la sumon tre prokraste. Estas do necese, ke en ĉiu loko, kie estas SAT-anoj, ili kunvenu kaj elektu peranton, kiu faras ĉi tiujn laborojn (mendojn, monsendojn ktp.). Por simpligi la aferon, oni nur subskribu la leterojn kaj sendu la monon je la nomo de ekz. "Lugansk-SEU", "Sebastopol-SEU" ktp. Aparte ni akcentu, ke ni nur konsideros mendojn, kiuj portas oficialan stampon kaj estas subskribitaj de la peranto.

Per ĉi tiu aranĝo ni kredas multe helpi al niaj sovetiaj K-doj rilate la tujan plenumon de mendoj. A d m.

Profesoro Oldenburg pri esperanto

Ni profitis el plurfoja interparolo kun prof. Oldenburg, eminenta arkeologo kaj dumviva sekretario de l' Akademio de Sciencoj en Sovetio, por ekscii lian opinion pri esp-o. Ni opiniis, ke ĝi povos esti utila al ni ĉi tie, kiel ankaŭ al sovetaj K-doj.

Jen ĝi: "Mi estas firme konvinkita, ke internacia helplingvo estas nepre necesa. Mi scias, ke esp-o faris jam gravajn progresojn k ke ĝi tute ne intencas forigi la naciajn lingvojn, sed utili apud ili. Kaj cetere nur tian rolon, rolon de helplingvo, ĝi devas plenumi k tian rolon mi plene aprobas. Ĉiuj fortoj de esp-istoj devas antaŭ ĉio koncentriĝi je precipa k ĉefa demando: kreo de bona, granda k kiel eble plej kompleta vortaro. Per tia verko vi povos ja plej facile almiliti la sciencan mondon. Facila gramatiko de esp-o ebligas rapide kompreni la mekanismon de la lingvo. La kompleta vortaro ebligos al ĉiu scienculo legi k ĉion kompreni en esp-o. Ĝi povos ankaŭ instigi al verkado en la facila lingvo. Do mi ripetas: La ĉefa demando por esp-o estas havi kiel eble plej kompletan vortaron, kiu permesu al ĉiu kiel eble plej rapide uzi la lingvon, sen specialaj serĉadoj." S. G.-K.

RADIO-INFORMOJ

La disaŭdigoj de la Nederl. Federacio de Lab. Esp-istoj okazas en Hilversum (Nederlando) — ondlongo 1071 m — ĉiudimanĉe matene de 8.50 h. ĝis 9.05 h. MET (notu la ŝanĝon). Unue okazas holandlingva k poste esp.-lingva paroladoj. Parolanto: K-do F. Faulhaber, prezidanto de NEFL.

K-doj! Helpu sukcesigi al niaj K-doj sendante raportojn al VARA, Postbus 50, Nederlando.

*

Blankrusia Radio-Centro akceptas leterojn k artikolojn de ĉiulandaj K-doj por disaŭdigi ilin per Minska k Gomela radio-stacioj en peresp-a fako de blank ruslingvaj radio-gazetoj.

La Minska radio-stacio preparas sin por saluti la 9-an SAT-Kongreson. En junio okazis raporto pri la Kongreso.

Aŭskultu Minsk-on ĉiumarde de 20.40 ĝis 21.20 h. (ŝanĝita depost 15. majo)!

RADIO — LEIPZIG

Ŝanĝo de ondolongo

La 12-an de julio raportas s-ro prof. Dietterle, Leipzig perradie pri la preparaj laboroj por la 9-a SAT-Kongreso. Nur nun estas sciigata, ke jam depost la 30-a de junio k. j. ŝanĝiĝos la ondolongoj de la germanaj sendstacioj. La sendstacio MIRAG en Leipzig de citita tempo sendos sur ondolongo 1157 kc/s 259 metroj. Dum la daŭro de la Kongreso (lundo ĝis ĵaŭdo) okazos ĉiuvespere de 22-a ĝis 22.10-a horo raportoj esp-lingve pri la kongreslaboroj. Krome estos disaŭdigata la parolado de K-do Drezen-Moskvo pri "moderna sociologia lingvoscienco k mondlingvo", okazonta mardon (6. 8.) je 17-a horo.

Nia sendstacio estas tre scivolema, ĉu ĝi estos aŭdebla en eksterlando. Jen, favora okazo por pruvi tion per esp-o!

K. K.

ANTAŬKONGRESA RENKONTIĜO EN STETTIN

La Stettina Esp. grupo volas aranĝi antaŭkongresan renkontiĝon, por ke ni havu eblon vojaĝi kun la Gek-doj el nordaj landoj karavane el Leipzig k ricevi rabatitan veturprezon.

Kelkajn vortojn pri nia urbo. Ĝi lokiĝas ĉ. 60 kilometrojn de la balta marbordo, kaj estas bela veturado per vaporŝipo de la konata banloko Svinemünde al Stettin. Unue oni traveturas la golfon kaj poste la belan Oder-valon. La rivero Oder trafluas nian urbon kaj dividas ĝin en du partojn, kiuj estas interligitaj per tri pontoj.

En la haveno mem oni preterpasas kelkajn ŝipfarejojn, sed la plej granda el ili (Vulkan) estas bedaŭrinde malkonstruita, kio kaŭzis grandan senlaborecon. Ĉe la riverbordo estas konstruita sur la t. n. "Haken"-teraso la muzeo, de kie oni havas belegan perspektivon.

La esp. movado ne tiom bone disvolviĝas, kiom ni deziras, kaj tial ni petas la Gek-dojn viziti nin, por ke ni povu aranĝi publikan kunvenon k tiele antaŭenpuŝi nian movadon. Do, via devizo estu: Veturonte al la Leipziga Kongreso, mi nepre vizitu Stettin-on. (Atentu la anoncon en la antaŭa n-o).

Ĵus aperis la riĉenhava junia kajero de



LA NOVA EPOKO

Literatura serio

ENHAVO: N. KRASSOVSKIJ: En la vojaĝo. Poemo (laŭ TAN). — GLEB USPENSKIJ: Sen propra volo. El la konversacioj kun amikoj pri la potenco de la tero. El la rusa trad. Nelmens. — KARIB USMAN: "Ĉulpan" (Polusa Stelo). Rakonto. El la tatara trad. Faik Bahtejev. — N. V. NEKRASOV: Limoj de l' Fantazio. Kritika skizo pri nova originala romano de Teo Jung. (Fino.) — J. REININGER: La nova literaturo. — E. DREZEN: Historio de la Mondlingvo. (Tri jarcentoj da serĉado.) El rusa lingvo trad. N. Hohlov. Ĝenerale redaktis N. Nekrasov. (7-a daŭrigo.) **Unuopa n-o 0.35 mk. g.**

ADMINISTRACIO DE SAT, COLMSTR. 1, LEIPZIG O 27

KONGRESANOJ TRAPASONTAJ VARSOVION!

Esp-istoj, apartenantaj al klasbatalaj organizoj, kiuj veturas ĉi-somere al Leipzig (SAT-kongreso), Wien (Int. Socialista Junular-Kunveno), t r a W a r s z a w a (Pollando), estas petataj sciigi pri la preciza dato de sia alveno k daŭro de sia ĉeesto en Warszawa laŭ jena adreso: Laborista Esperantista Societo "LABORO" en Pollando, W a r s z a w a, Marszalkowska 81, adv. Litauer.

URĜE!

Esp-istoj, partoprenontoj de la Internacia Socialista Junular-Kunveno en W i e n (julio), bonvolu nepre tuj anonciĝi ĉe: K-do Józef Litauer, W a r s z a w a (Pollando), Marszalkowska 81, por organizi propagandon por SAT esp-o dum tiu kongreso.

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

AŬSTRIO. SAT estos oficiale reprezentata en la Internacia Junulara Tago (julio) en Vieno de K-do J. Litauer (1368), prezidanto de la pollingva LEA. — Oni notu en la Jarlibro, ke la Vienaj SAT-anoj elektis kiel (novan) peranton K-don Herzy Stefan (8863). Subperantino estas K-dino Schüler Risa (9262). — **BELGIO. Bruxelles.** La SAT-rondo fondita en apr. 1928 ekdormis post sesmonata vivo. La tiama komitato ne funkciis. En majo okazis la jarkunsido, kiu elektis novan komitaton (K-doj Bergiers, Kaulich, Van Gerssom). Dum junio la komitato prezentis ampleksan laborprogramon. Ĉiumonate okazos unu kunsido de LEA-grupo, en aliaj semajnoj kunsidoj de SAT-rondo (unu oficiala, 2—3 kulturaj). Estas 49 SAT-anoj. (8464) — **ĈEĤOSLOVAKIO. Plzen.** Lab. societo esp-ista Plzen I aranĝis 25. 5. esp. vespereton kun malgranda ekspozicio. Partoprenis multaj esp-istoj el ĉiuj esp. kluboj en Plzen, ankaŭ K-do el Polio, kiu parolis pri sia vojaĝo tra Ĉeĥosl., K-do Pech pri vojaĝo tra Hisp. La propagando por nova kurso havis grandan sukceson. — **NEDERLANDO.** Laŭ "Lab. Esp." fondiĝis *2* novaj sekcioj Amsterdam V k Haarlem; la unua havas 27 membrojn, la dua 10. La tuta Federacio (nederl. LEA) nun havas 317 membrojn. — **SOVETIO. Tuapse.** Je 1. majo nia organizo ricevis salutlet. el München k Leipzig. Tradukojn de la leteroj ni sendis al 11 organizoj. Laŭ decido de regiona unuamaja kom. ili estis presataj kiel flugfolioj en kvanto da 2500 ekz. k dum festkunsido de l' urba soveto disdonataj, same dum la stratmanifestacio. Tradukoj aperis en 3 murgazetoj. Dum ĉiuj parti-, junular-, prof-, libervol-organizaj kunvenoj ili estis laŭtlegataj. El 30 mil loĝantoj de nia urbo 90% legis la let. Bedaŭrinde nia kooperativo ankoraŭ ne kredas je esp-o, ĉar post anonc-deziro (en n-o *229*) ĝi ricevis nur unu leteron. Tio malhelpas nian movadon. Salutlet. ricevotaj por 6. 7. nepre same aperos presite. (3935)



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Dr. L. L. Zamenhofs Esperanto-Reden (Esperanto-paroladoj), faritaj ĉe la malfermo de la Esperanto-Kongresoj 1905 ĝis 1912. Kun enkonduko pri programo k deveno de l' esperantismo, akompana germana traduko k komentoj. Eld. d-ro E. Pfeffer. Steyrermühl-Eldonejo, W i e n I, Wollzeile 20. ("Tageblatt"-Biblioteko.) Form. 12×19 cm. Pĝ. 175. Prezo: 1.20 mk. g.

La Tagblatt-Biblioteko, kiu eldonis jam diversajn vortarojn k lernilojn de esp-o, prezentas jen dulingve (germane k esp-e) la konatajn kongres-paroladojn de d-ro Zamenhof. Speciala rekomendo de tiuj bonstilaj, ideoplenaj paroladoj ŝajnas nenecesa. Bedaŭrinde s-ro Pfeffer tro faciligas al germanlingva studanto per tiaj eldonoj la studadon. La lernanto ofte sentos sin tentata prefere legi la nacilingvan tekston ol la originalon k — evitos la propran penadon k fine la ellernon... N. B.

Esperanto ein Kulturgut? (Esperanto kulturakiraĵo?). Ĝia esenco k valoro en la fajro de l' kritiko. D-ro J. Kreutzer. Eld. Heroldo de Esperanto, K ö l n, Brüsseler Str. 94. Pĝ. 110. Form. 15×22 cm. Prezo: 1.80 mk. g. Germanlingva.

Tiu ĉi verko estas tre klare verkita, bona dokumento pri la esp. movado. Ĝi estas propaganda verko, sed instruas ankaŭ la aktivan esp-iston pri multo el la movado. Tiel ekz. la lab. esp. movado, SAT, "S-ulo", "La Nova Epoko" ktp. estas objektive konigataj. Ŝajnas al ni iom riske, por rekomendi esp-on de naciista vidpunkto, citi la akcelon de esp-o en faŝista Italio, ĉar laŭ la fakta situacio tiu akcelo estas "surpapera", malreala. Interesa ĉapitro estas tiu pri mondkulturo k mondhelplingvo (pĝ. 70/75), en kiu la aŭtoro agnoskas la tendencon de SAT uzi esp-on kiel unununuran mondkulturan lingvon, sed defendas kontraŭ tiu tendenco per ĉiuj rimedoj, per citoj de famuloj neceson k dezirindon de naciaj kulturoj. Li diras: "...Ni devas tiun ĉi valorigon de esp-o kiel necesa portanto de mondkulturo — kvankam ni malakceptas tiun celon kiel nerealigeblan en antaŭvidebla tempo — tamen noti p o z i t i v e kiel merititan agnoskon de esp-o kiel altvalora kulturfaktoro." Fakte la aŭtoro vidas la gravan rolon, kiun ludas lingvo en la sociaj rilatoj, sed li ne riskas fari la logikan konkludon, mem estante tro ligita al sia nacia medio. N. B.

Qu'est-ce que le B. I. A.? Franclingva varbilo (broŝureto) de l' Internacia Antimilitarista Oficejo. Ĝi estas senpage havebla ĉe: Sekretariejo de B. I. A., Laurierstraat 127, H a g o (Holando). N. B.

Ĉe la neŭtraluloj

Laŭ raporto de la Belga Ligo Esp-ista por 1928 la Antverpena grupo "Verda Stelo" (Antverpeno estis la mondkongres-urbo en 1928) kalkulis preskaŭ 700 membrojn. Krome tre sukcese laboris nova grupo en Kortryk (Courtrai), kies kurson ĉeestis ĝis la fino pli ol 160 gelernantoj. La tiea urbestraro subvenciis la grupon per 750 frk. k disponigis ĉambregon en la urbdomo. Sume en Belgio okazis 50 kursoj (ĉe neŭtraluloj) dum 1928, kun 1000 lern., *2* radiokursoj, laŭ kiuj *300* p. mendis lernolibrojn.

*

La orient-franca neŭtrala esp. federacio grupiĝas ĉefe en la urboj Strasburgo k Nancy. Sume ĝi konsistas el *12* grupoj. La plej malnovaj estas tiuj de Strasburgo k Mulhouse. Perkorespondaj kursoj havis en plej favora okazo (1928) 108 lern. Unu sportklubo en Strasburgo. La delegitoj, ĉeestintaj la fed. kongreson 1928 (Saverne), reprezentis membrokvanton da *222* membrojn.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

L e s E t u d i a n t s N o u v e a u x, Paris, majo (Tago el Estonio). T h e S c h o o l m a s t e r s & W o m a n T e a c h e r s C h r o n i c l e, London 6. 6. (Nia infankolonio, Loŝarivska, kun la desegno).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

P r o l e t a V e r o, Kiev, 4. 5., 28. 4., J u n a B o l ŝ e v i k o, Kiev, 30. 4., S i g n a l e n, Stokh. 6. 6. priparolo detala de Somera n-o de Sveda Lab. Esp. Asocio), L a D é p ê c h e D a u p h i n o i s e, Grenoble, 3. 6., P r a v d a, Praha, 7. 6., S l o v a c k o, Praha, 9. 6., M ü n c h e n e r P o s t, 3. 6., S v e n s k a J ä r n v ä g s t i d n i n g e n (fervojista), Stokh., 1. 6.

Menciis SAT:

K i e v a P r o l e t o, Kiev, 26. 5.

Pri SAT-Kongreso raportis:

K o r r e s p o n d e n t (presista sindikata gaz.), Berlin, 8. 6.

Peresper. materialon enpresis:

P r o l e t a V e r o, Kiev, 1. 5., K a m p a r a n a ĵ u r n a l o, Kiev, 9. 5., K i e v a P r o l e t o, 1. 5., 14. 5., D e r f r e i e A r b e i t e r, Berlin, 8. 6., L e s E t u d i a n t s N o u v e a u x, Paris majo, T r a v a i l l e u r d u L i v r e e t d u P a p i e r, Paris, majo.

L a K-d o j s e n d a n t a j a l R e d a k c i o j a r t i k o l o j n e l "S-u l o", n e p r e p o s t u l u, k e n i a g a z e t o e s t u m e n c i a t a!

Nekrologo

Kun granda doloro ni sciigas la SAT-anaron, ke la 13. IV. 1929 venenis sin nia fervora K-do

H. WEISS (10 823)

kiu sian tutan vivon dediĉis al la esp. movado. La kaŭzon de l' venenigo oni ne scias precize, ĉar li nenion restigis. Laste li okupiĝis pri instruado k lekciado en laborista universitato. Liaj multnombraj amikoj-korespondantoj lin ĉiam memoros.

S A T-a n o j e n L o d z (Polio).

NIA POŜTO

M. Sasaki. — Vi ja devas sendi viajn manuskriptojn senpere al la redaktejo, se vi deziras, ke ili aperu sen prokrasto. Via artikolo pri la 1. majo bedaŭrinde ne plu estas aktuala. — E. L.

4967. — Ni klarigis al ni la vorton "boraksa" metafore, konsiderante, ke la j. 1917 signifis profundan (boran) ŝanĝon de la akso de l' mondhistorio. Eble tamen la aŭtoro fuŝis en la de vi klarigita maniero, k li volis vere diri "uragana, malkvietega". La alia korektindaĵo estas simpla preseraro facile korektebla de ĉiu leganto mem.

3935. — Atentu, ke "alvokoj" ne estas senpagaj.

8048. — Unu manuskripton trovu presita en ĉi tiu n-o. Pri uzo de l' cetera materialo ni ne tuj povas decidi: ni uzos en okazo de bezono. Red.

La Literatura Komisiono de SAT sciigas, ke la plendo de K-do Mahler Adalb., Wien (10 329), kiu aperis en n-o 238, pro nerespondo al li depost 15 monatoj, estas senbaza, ĉar ĝi neniam ricevis ian ajn leteron de li.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis

AŬSTRIO

K-do Alfred Fischer, Brucknerstr. 4, Steyr, dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl., krom germanlingvanoj. Resp. garantiata.

— Esperanto-Klubo "Laboro" serĉas gekoresp-antojn en la tuta mondo. Oni skribu al: K-do Christian Binder, Grabengasse, 4, Wels.

FRANCIO

— **Naturamikoj** sendu vian regionan gazeton kontraŭ la nia el ĉ. regionoj. Ĝis nun mi ricevis el Holando, Saksio, Nordbavario, Turingio k Rejnlando. Laŭ mia scio ekzistas en Germ. mem 18 region. bultenoj. Adr.: Jean Wutte, Ober-Betschdorf, Bas Rhin.

K-do Guilloux, 7, rue Pocquet-Livonières, Angers, dez. interŝ. PM, kĉl.

GERMANIO

K-do Friedrich Giefer, (29 j. fraŭlo), Eintrachtstr. 23, Mayen i. Rhld., dez. koresp. L, PI, bfl. kĉl.

K-do P. Conzelmann, Brunnenstr. 7, Taiflingen i. Württ., dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, precipe pri muziko, literaturo, politiko, ekonomio. Resp. garantiata.

K-do Ernst Berg (21 j.), Gabelsbergerstr. 1, Ohligs i. Rhld., dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, prefere kun Skandinavio. Resp. garantiata.

K-do Bruno Madretzke, Berliner Str. 76, Breslau — 3, dez. koresp. kĉl., L, PK, PI, bfl. Resp. garantiata.

HISPANIO

K-do Rafael Barrios, Str. Pedro Joaquin Soler, 4, 2°, Zaragoza, (20 j. juvelisto), dez. koresp. kĉl., precipe pri artoj k moroj, L, PK, PI. Certe resp.

NEDERLANDO

Adresŝanĝo. — K-do J. Pieperiet (SAT 1940) Liperkerkstr. 283, Enschede nun loĝas: Estrikstr. 37, Enschede.

SOVETIO

K-do Zakotnov, Krasnaja, 32, Slavjanskaja, Kub. okr. dez. koresp. kĉl. pri ĉ. t. pref. ĉasado, sporto L, PK, PI.

K-do A. V. Popov, per. Pleĥanova, 22, Tomsk, Siberio, dez. koresp. kĉl. pri gitarludo, interŝ. muziknotojn, fotojn, L, PI, PK.

K-do T. Barbarŝin (poŝt-telegrafisto), Ulalskaja, 40, Buzuluk, Sr. Vol. obl., koresp. kĉl., L, PK, PM.

K-do P. Akimov Amur Niĵedreprovsk, str. Potornaja, 5, Dnepropetrovsk, dez. koresp. kĉl.

— Juna kom-isto dez. koresp. kun samcelanoj k gepioniroj. Adr.: Ruza, Mosk. gub., Staraja Ruza, dom otdiĥa "1 maja" al P. Spodobin.

K-do Konstantino Ĉencov (librotenisto), Bajkalskaja, 44, dez. koresp. kun Ameriko, Azio, Aŭstralio k Afriko, PI. Resp. garant.

K-do I. Ionov, Gordeevka, 29, linija, dom 5, Kanavino, Niĵni-Novgorod, dez. koresp. kĉl., precipe kun komencantoj, estante mem komencanto.

— Esp. rondeto ĉe Pskova Malliberejo, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Adr. Pskov, Postnikovskaja, 19, al K-dino M. Vronskaja.

K-do Boriso Mileŝkin, Ciganskaja, 31, kv. 4, Saratov (20 j.), dez. koresp. kĉl. pri div. temoj. Resp. garantiata.

K-dino F. M. Radionova, M.-Kirpiĉnaja, 19, kv. 1, Tomsk, dez. interŝ. L, PK, koresp. pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

K-do D. Jakov Ĵitniĥ (PTT-isto), Tomsk, dez. koresp. pri ĉ., temoj kĉl., L, PK.

K-dino A. Kosolapova (PTT-istino), Neĉevskij per. 7, kv. 3, Tomsk, dez. koresp. kun Gek-doj el ĉl. pri div. temoj, L, PK.

K-do K. Ŝeĥaljov (fervojisto), dez. koresp. kun Gek-doj el ĉl., L, PK, ktp., Tomsk, Tatarskij pereulok, 2—4. Resp. garant.

K-dino Galina Braĵnikova (SAT-ano 13 296), Spasskaja str. 16—4, Tomsk, dez. koresp. kĉl. pri politiko, etnografio, arkeologio ktp. Resp. garant.

— Kolektivo de PTT-istoj, dez. koresp. kun kolegaroj pri lab-vivo, labor-kondiĉoj, PTTR-aferoj ktp. Resp. garantiata. Adr.: Tomsk, Siberio al Labor-Komitato de PTT-istoj.

K-do G. Doronin, Redakcia Gazeto "Selskaja Prawda", Novosibirsk, dez. interŝ. L pri ĵuralismo, literaturo, politiko k sociproblemoj.

K-do Bazilo Sobolev, Vladimirski per. 5, kv. 3, Tver, 3, dez. interŝ. ĵurn., gaz., bildojn kĉl. Resp. garantiata.

K-do Leonido Strokovski, G. S. P., Poĉtamt, Rostov/Don, dez. koresp. kun komencantaj verkistoj k literaturistoj.

K-do N. Polakov, Kirpiĉnaja, 16, kv. 1, Saratov, dez. interŝ. PM, monon.

K-do A. Kolpakov (laboristo), "Koĵzavod", Barnaŭl, dez. koresp. kĉl. junularo pri ĉ. temoj.

K-do A. Kolemaskin (laboristo), Koĵzavod", Barnaul, dez. koresp. kĉl., pri ĉ. temoj, L, PK, PI. Certe resp.

— Kiu povas aŭ vendi aŭ ŝanĝi la oktobran n-on de "La Nova Epoko"? Adr.: K-do N. R. Aleksandrov, Dolinskaja, Krivo-Rogsk. okr.

K-do A. Petrenko, Ĵeleznodoroĵnaja, 4/14, Dnepropetrovsk, dez. koresp. kĉl. gejunularo. Resp. garantikoresp. kĉl. gejunularo. Resp. garantiata.

K-do K. Laskavi, str. Skvoznaja, 11/1, Dnepropetrovsk, dez. koresp. kĉl. gejunularo. Certe resp.

— Kolektivan koresp-adon kĉl. dezir-as: Akimov P. Amur Niĵedneprovsk, Elektromeĥaniĉeskie masterskie, Dnepropetrovsk.

K-do I. Troŝin (junlaboristo), "Koĵzavod", 2, Barnaul, interŝ. L, PI, fotojn kĉl. junularo k lab-istaro pri ĉ. t. Resp. garantiata.

K-dino F. Kaganoviĉ, Borisovskij trakt, 16, Minsk, dez. koresp. serioze pri literaturo, arto k socia vivo.

K-do V. Bogdanoviĉ, Kavalerijskaja, 32, kv. 1, Minsk, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

— Pionir-taĉmento je la nomo de Buĥarin dez. koresp. kun geknaboj el ĉl. pri ĉ. temoj. Skribu multnombre al K-do B. A. Ejdmiller, Srednij prosp. 50, kv. 5, Rostov/Don. Ni ĉiam tuj resp.

K-do V. P. Proc, ul. Sabino, Lengorodok, Rostov/Don, dez. koresp. kĉl. pri sporto, kluba laboro, lab. vivo ktp.

K-do I. Baŝkirov, Ĉerniŝevskaja, Zoosad, Kazan, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

K-do N. I. Ĉistjakov, Starosadskij per. 9, kv. 4, Moskvo, dez. koresp. kĉl., L, PK, PI, PM, bfl. Resp. garantiata.

K-do Jakob Kuzmin, Stretenka Seliverstov per. 10, kv. 9, Moskvo, dez. koresp. pri ĉi tiuj temoj: sport- k ateist-movadoj, L, PI. Certe resp.

ENHAVO:

	paĝo
La formiĝo de tutmondaj trustoj	393
Pri klasbatalo	394
Strikmovado en Bulgario	394
La kontraŭfremdula Usono	394—95
El Jugoslavio	395
Al ĉ. SAT-anoj k proletaj esp-istoj de Pacifik-Oceanaj landoj k de la tuta mondo!	395
Konsumkooperativo Lajpcig-Plagvic k ĉirkaŭaĵo	396
Ni ricevis jenan leteron	397
La redaktoro de "Balkana Laboristo" denove arestita	397
Sennaciula Virina Paĝo	398
Tra Esperantio	399/404
Korespondado	404

Presejo: Peuvag. Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)